

ESPERANTO

7-12372/24 143360

JARLIBRO

de la Esperanto-Movado

1936



Universala Esperanto-Asocio
I Tour de l'Île, Genève, Svislando

La verko, kiu trovis ĉies aprobon, kiun la recenzistoj unanime laŭdis kaj rekomendis; la libro, kiun devas nepre posedi ĉiu serioza esperantisto, tiu estas nekontraŭdireble la

PLENA VORTARO DE ESPERANTO

verkita de Akademiano

E. GROSJEAN - MAUPIN
kaj membroj de la Lingva
Komitato S-roj ESSELIN,
GRENKAMP kaj Prof.
WARINGHIEN.

Tiu plej grava kaj necesa verko el la esperanta literaturo aperis en 2-a eldono, reviziita, kompletigita kaj tiel atingis gradon de perfekte nefacile supereblan.

LA PLENA VORTARO DE ESPERANTO

estas la plej malkara libro, tial ke ĝi estas ĉiutaga konsilanto, ĉiam aktuala, daŭre utila.

PLENA VORTARO DE ESPERANTO

512 paĝoj, formato 145 × 200 mm. tuttola bindaĵo, kun orumita titolo

Prezo: sv. frk. 12.—
plus 10% por afranko
kaj registrigo. **Havebla
de la Libro-servo de la**

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

I Tour de l'Île

GENÈVE (Svislando)



*Ridetu kun la
knabineto kaj
estu feliĉa!*

LEGU, LEGU

'BONHUMORO'

de PAUL NYSENS

Kaj via vivo fariĝos ege
pli agrabla. Tiu libro estas
vera "feliĉigilo"

TABELO DE LA ĈAPITROJ:

Dediĉo — Antaŭparolo — Feliĉo kaj malfeliĉo —
Bonhumoro — Advantaĝoj de bonhumoro — Ni
alprenu la vivon je ĝia bona flanko — Sendiskutaj
fontoj de ĝojo — Pripensita optimismo — Nia povo
nin memregi — Nia povo nin plibonigi — Espero —
Kredfiko — Kuraĝo — Submetiĝo — Animsende-
pendeco — Amo al la proksimulo — Universala amo
— Sintenado — La profundaj kaŭzoj de malbon-
humoro — Sano — Nutrado — Spirado — Sango-
rondirado — Fizika kulturo — Konscienco serena —
Sintenado — Beleco — Longa vivdaŭro — La rideto
— Perfektiĝo — Gajeco — Koreksteriĝo — Ĝojo —
Konkludo

Prezo kun sendkosto 2.50 sv. fr.

ĉe LIBRO-SERVO DE U.E.A.

~~277.~~ Nr. 538

JARLIBRO

DE LA
ESPERANTO - MOVADO

1936

(24-a Jaro)

(1-a eldono en 1908; ne aperis en 1915, 1917-1919)

La enhavo de ĉi-tiu Jarlibro ne povas esti represata,
ĉu tute, ĉu parte, sen la permeso de U.E.A.


Copyright by Universala Esperanto-Asocio,
Geneva, Switzerland

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

1 TOUR DE L'ILE, GENÈVE (SVISLANDO)

Związek Esperantystów w Polsce
ODDZIAŁ W WARSZAWIE,
ul. Marszałkowska - 81m.32.
N-10 ~~71~~ 538

PRINTED IN ENGLAND



Y-18679

ENHAVO

	Paĝo
Antaŭparolo. <i>La Prezidanto</i>	6
Klariga Enkonduko. <i>La Direktoro</i>	8
Komitato	10
Estraro	12
Raporto	13
Bilanco kaj Kontoj de U.E.A.	17
Statistiko laŭlanda de la membraro	20
Patronoj	22
Honoraj Membroj	23
Dumvivaj Membroj	25
La Mortintoj 1935	29
Lingva Komitato kaj Akademio	36
Raporto de la Lingva Komitato	41
Konsiloj al la Delegitoj	47
Raporto de la Radio-Komisiono	50
Internacia Esperanto-Muzeo	56
Gazetaro Esperantista	57
Esperantistaj Landaj Asocioj	63
La Esperanto-Movado en diversaj landoj	66
Landaj Ĉefdelegitoj kaj Perantoj	89
La Delegitaro	92

ANTAŬPAROLO

Jen la Jarlibro de U.E.A. por 1936.

Eble kelkaj kritikemuloj diros: ĝi aperas nur en junio! Tamen en la nunaj cirkonstancoj ni povas gratuli nin pri tiu rezultato.

Antaŭ unu jaro kaj duono komenciĝis nova epoko por U.E.A., certe esperplena, sed unue mizera. Ne havante plu monrezervojn ni devis plenumi nian taskon en tre malfavoraj kondiĉoj: ekvilibro de nia budĝeto estis nia ĉiutaga malfacila zorgo. Efektive, por fari necesegajn ŝparojn, ni devis amasigi sur unu personon la trioblan ŝarĝon de Direktoro de la Internaj Aferoj (antaŭa U.E.A.), Direktoro de la Eksteraj Aferoj (antaŭa I.C.K.), Redaktoro de la Revuo. S-ro Kreuz akceptis tiun terure pezan ŝarĝon, kaj mi adresu al lia memoro nian profundan dankon pro lia grandega laboro. Sed li ne povis antaŭenpuŝi la propagandon, kiu devus esti unu el liaj ĉefaj taskoj. Baldaŭ lia unua malsano, poste subita morto lasis nian Centran Oficejon en tre grava embaraso. Dank' al tuja helpo de S-ro Movo, kiu bonvolis plenumi senprokraste provizoran direktorecon, ni povis daŭrigi niajn servojn seninterrompe.

Tiu unujara sperto montris, ke ĝisfundaj ŝanĝoj fariĝis necesaj. Nia programo—poste pliampleksigota—estas:

Daŭrigi kaj plireguligi funkciadon de niaj servoj.

Liberigi la Direktoron de la zorgoj pri nia revuo.

Antaŭenpuŝi la propagandon en multaj rondoj.

Atingi larĝan ekvilibron de nia budĝeto, favore al nia regula funkciado kaj al la necesaj propagandaj elspezoj.

Tiu programo necesigas tutan vicon da rimedoj. La Estraro, dum sia Paska Kunveno, pristudis la precipajn, kaj se la Esperantistoj komprenos nian veran situacion, se ili helpos, ni rajtas esperi, ke tiu nova epoko de U.E.A. estos fruktodona.

Tiu ĉi Jarlibro jam montras la nunan progreson. En 1935, pro manko de mono, ni liveris al niaj aktivaj membroj maldikan suplementon; hodiaŭ ni prezentas al ili kompletan jarlibron, restante en la limoj de nia budĝeto. Pro manko de tempo, la suplemento 1935 aperis en novembro; tiu ĉi aperas en junio, kaj ni preskaŭ povas promesi, ke la venontan jaron ĝi aperos dum la unuaj monatoj. Pli ne enkondukis novan rubrikon, kiun certe ŝatos la legantoj: raportoj de niaj diversaj Komitatoj aŭ Komisionoj, kaj historio de la Esperanto-movado en diversaj landoj. Tiu parto ne ankoraŭ estas kompleta tiun ĉi jaron; ĝia formo ankaŭ pliboniĝos, kaj tiamaniere nia Jarlibro entenos la ĉiujaran historion de la tuto de la movado de niaj U.E.A.-organizoj.

Ĉu tio signifas, ke nia Jarlibro estas perfekta? Pli ol kiu ajn, ni sentas, kio mankas al ĝi. Ni klopodos por liveri al niaj membroj, dum la venontaj jaroj, jarlibron pli kompletan, pli bone prezentitan.

Sed ni devas progresi ankaŭ sur multaj aliaj kampoj. Malgraŭ la malfacila tempo ni nepre volas antaŭenpuŝi U.E.A., malfermi novajn horizontojn pli vastajn, uzi la unuigon de niaj Landaj Asocioj kaj la agemon de iliaj fervoruloj, unuecigi ĉiujn valorajn fortojn de nia movado, krei tiun impulsan centron, kies mankon ĉiuj sentas. Ne helpataj, ni ne povas efektiviĝi tiun programon, ni nur povas montri la celon. Karaj Samideanoj, restu fidelaj, varbu novajn membrojn! Nur kun helpo de ĉiuj ni povos atingi tiun celon. Por ke ĉiuj povu esti membroj de U.E.A., oni kreis la kategorion "simplaj membroj," tre malmultekostan, sed kiu ne ebligas al ni vivi. Tiuj, kiuj povas fariĝi "aktivaj membroj," ĉu kun jarlibro, ĉu abonantoj, ne estas kvitaj kontraŭ U.E.A., kiam ili akiris la simplan membrecon: ili *devas* sin enskribi en tiuj kategorioj. Kaj la donacemuloj povas ankaŭ sin enskribi kiel subtenantojn aŭ kiel patronojn. Niaflanke ni promesas, ke senĉese ni klopodos por igi U.E.A. ĉiam pli utila, ĉiam pli vigla, ĉiam pli potenca, ĝis la nepridubebla fina triumfo de nia idealo.

L. BASTIEN,

Prezidanto.

KLARIGA ENKONDUKO

Ni sukcesis dissendi la Jarlibron 1936 iom pli frue. Ĝi prezentas plibonigon kompare kun la Suplemento 1935, tamen ni bone scias, ke ni ne evitis gravajn mankojn. Ni devis pretigi la Jarlibron laŭ la informoj de la oficejo. Sed la oficejo ne dissendis al la Delegitoj en aŭtuno 1935 la kutiman demandfolion kaj pro tio ĝi eble enhavas erarojn, pri kiuj ni pardonpetas. Ĉiu membro konas ja la malfacilaĵojn de la nuna jaro. Ni ankaŭ ne enmetis la informon pri la Grupoj (krom la Grupoj en kelkaj urboj, kiuj pagis por la enpresigo), sed ni esperas forigi tiun mankon en la venonta eldono.

Ankaŭ en la nuna Jarlibro mankas informo pri la fakaj kaj laboristaj organizaĵoj, denove pro manko de ĝisdataj detaloj en la oficejo. Se la sekretarioj de tiuj organizaĵoj sendos al ni la necesan informon dum Novembro 1936 ni enmetos ĝin en la venonta jarlibro. Ni dissendis cirkuleron al la Landaj Asocioj, petante informon pri la stato de la movado en la landoj, sed ĉar kelkaj ne respondis, tiu parto de la Jarlibro ne estas tiel komplete kiel ĝi devus esti. Espereble dum la venonta jaro ĝi estos pli ampleksa. Lastmomente ni informiĝis, ke la Nederlanda Asocio sendis tian raporton, sed ŝajne ĝi perdiĝis survoje.

Se nia atendo pri sukcesa laboro efektiviĝos ni intencas dissendi al la Delegitoj la demandfoliojn en oktobro kaj aperigi la Jarlibron por 1937 jam en februaro. Ni petas tiucele la aktivan subtenon de ĉiu membro.

C. C. GOLDSMITH,

Direktoro.

Mallongigoj Uzitaj en la Jarlibro

ĈD = Ĉefdelegito	L = lundo
D = Delegito	M = mardo
FD = Fak-delegito	Mk = merkredo
VD = Vic-delegito	J = jaŭdo
EG = Esperantista grupo	V = vendredo
EO = Esperanto-oficejo	S = sabato
Adr. = adreso	D = dimanĉo
Ejo = kunvenejo	

CENTRA OFICEJO DE U.E.A.

Internacia Esperanto-Oficejo. Bureau International de l'Esperanto. Internationales Esperanto-Amt. Ufficio Internazionale dell' Esperanto.

1 Tour de l'Île, Genève

Aŭtomata lifto. Telefono : 50.036.

Direktoro : Cecil C. Goldsmith.

Oficistoj :

René Buchenel, Marguerite Jörin, M. Movo (M. Wittenberg), Renée Rivollet, Madeleine Stakian.

Poŝtĉek-Kontoj :

Svisa: I.2310 Genève. *Eksterlando:* 184200 Bruxelles. 59800 Budapest. 908.50 Frankfurt a.M. 1457¹⁰ s'Gravenhage. 22176 Lyon. 79236 Praha. 4138 Stockholm. 190576 Warszawa. 105439 Wien. 40759 Zagreb.

Bankoj: Société de Banque Suisse ; Banque Populaire Suisse.

Telegram-Adreso : Esperantocentro Genève. Kodoj : Code Lugagne ; ABC-5th Edition ; Everybody's Pocket Code.

“ Esperanto ”

Internacia Revuo, eldonata de la Universala Esperanto-Asocio. Fondinto : H. Hodler.

Redakcio : 1 Tour de l'Île, Genève.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Fondita : 28 aprilo 1908

Honora Prezidanto :
Ed. Stettler, Bern.

Prezidanto :
Intendanto-Generalo L. Bastien, Paris.

Vic-prezidanto :
Inĝ. I.R.G. Isbrücker, Den Haag (Nederlando).

Komitato

1. Membroj elektitaj de la Landaj Asocioj:

Aŭstrio : Vakas.

Belgujo : Henri Petiau, komerca direktoro, 60 Boulevard
St. Liévin, Gand.

Brazilo : D-ro Carlos Domingues, advokato, Rue Marechal
Floriano 212.10, Rio de Janeiro.

Britujo : A. C. Oliver, 28 Clarence Road, Londono, N.22.
Bernard E. Long, ŝtaticisto, p.a. Brita Esp. Asocio,
142 High Holborn, London W.C.1.

Ĉeĥoslovakio : Prof. D-ro St. Kamaryt, Zochova 3,
Bratislava. Prof. Inĝ. C. Scholze, Klotildenstrasse
6. II, Reichenberg-Liberec.

Danujo : K. Th. Hansen, farmaciisto, Oresunds Apotek
Strandvej, Köbenhavn.

Francujo : Intendanto-Generalo L. Bastien, 116 Rue de
Vaugirard, Paris VI.

D-ro J. Couteaux, dir. de malsanulejoj, Faubourg
St.-Jacques 27, Paris XIV.
René Dubois, komerca direktoro, 130 Rue Amelot,
Paris XI.
P. Petit, ŝipkonstr. redaktoro, 59 Rue de Neuilly,
Rosny-sous-Bois (Seine).

Germanujo : Vakas.

Hispanujo : Francisco Azorin Izquierdo, arkitekisto, Str.
Alvarez de Castro 9, Madrid.
Delfi Dalmau, Valencia 245, Barcelona.

Italujo : Vakas.

Japanujo : Ŝindo-Seitaro, komercisto, Premier House, 28
Higasi-Umeda-Maĉi, Kikatu, Osaka.

Nederlando : P. W. Baas, instruisto, Boerhaavestraat 42 I,
Amsterdam O.

P. Hendriks, instruisto, Vertolkstraat 7, Leeuwarden.

Norvegujo : Kapitano R. Bugge-Paulsen, I. IV Schivesgate,
Oslo.

Rumanujo : H. Fischer-Galatz, industriisto, Aléa Suter 19,
Bucuresti.

Svedujo : Einar Dahl, instruisto, Södergatan 26, Uddevalla.
Rektoro Sam Jansson, Bergsvägen 41, Lidingö.

Svislando : Ed. Stettler, juristo, Bern.

Usono : Prof. H. W. Hetzel, 48th Walnut Street, West
Philadelphia High School for boys, Philadelphia
(Pennsylv.).

2. Membroj elektitaj de la Delegitoj.

Univ. Prof. D-ro Odo Bujwid, Lubicz 34, Krakow (Polujo).
Prof. St. Minkow, ul. Sredna Cora 133, Sofia (Bulgarujo).

3. Membroj alektitaj de la supraj Komitatoj.

P. Blaise, komercisto, Litchfield Avenue 19, Morden, Surrey
(Anglujo).

Univ. Prof. D-ro med., D-ro jur. Giorgio Canuto, Via Palla-
maglio 15, Torino (Italujo).

Andreo Cseh, pastro, Riouwstraat 172, Den Haag (Neder-
lando).

Inĝ. I.R.G. Isbrücker, Oostduinlaan 32, Den Haag (Neder-
lando).

E. Malmgren, instruisto, Heleneborgsgatan 6, Stockholm 1
(Svedujo).

M. Rollet de l'Isle, ĉefinĝ.-hidrografo de la Franca Maris-
taro (Admiralo), 35 Rue du Sommerard, Paris V.
(Francujo).

Kortega Konsilisto H. Steiner, Neue Burg, Heldenplatz,
Wien 1 (Aŭstrio).


Prezidanto : Int.-Generalo L. Bastien, Paris.

Vicprezidanto : Prof. Inĝ. I.R.G. Isbrücker, Den Haag.

(Artikolo represita el *Esperanto*, Nov., 1935).

Estraro

- Prezidanto : Int.-Generalo L. Bastien, Paris.
 Vicprezidanto : Inĝ. I.R.G. Isbrücker, Den Haag.
 Membroj : Prof. D-ro St. Kamaryt, Bratislava.
 E. Malmgren, Stockholm.
 Kortega Konsilisto Steiner, Wien.



La 1 novembro la Universala Esperanto-Asocio komencis sian 28-an administran jaron. Estas ĝenerala kutimo ĉe komenco de nova periodo rerigardi al la malnova por kons-tati la rezulton de sia agado. Por nia asocio eĉ ekzistas rekta devo. Jam la "Interkonsento de Kolonjo," subskribita dum la 25a Universala Kongreso de Esperanto donis novan konstitucion al U.E.A. Grava progreso estis tiu ĉi paŝo al la unuecigo de la movado, en kiu U.E.A. fine ricevis la rolon de internacia centra organizo de la Esperanto-movado. Dum pli ol 10 jaroj la plej bonaj esperantistoj laboregis por tiu ĉi celo. Tre malfacila estis la klopodo. Ni ne parolas tie ĉi pri la div. fazoj de la evoluo. Ni nur registras la fakton, ke la bazo estis starigita je sufiĉe malfavora momento. Ne estas mirige, ke la unuaj paŝoj de la realigo en praktiko kaŭzis aron da malfacilaĵoj ne-antaŭviditaj, nek antaŭvideblaj. Tiel la okazintaĵoj de Stokholmo fine kondukis al plena klariĝo de la situacio.

La nova U.E.A.

La esprimo ne devenas de ni. Uzis kaj ankoraŭ uzas ĝin tiuj, kiuj preskaŭ malhelpis la necesan progreson de nia organizo en momento tre danĝera. La novaj gvidantoj staris antaŭ realeco, kiu ne lasis alternativon. Ili devis agi por savi la vivon de la asocio kaj ili faris tion sukcese. Neniaj konsideroj pure personaj, nek konkludoj tute senbazaj aŭ eraraj, nek sentimentaleco, aparte komprenebla, povos ŝanĝi la faktojn. Pri ili estis skribite sufiĉe en la kolonoj de nia revuo, same en la oficiala raporto al la Dudeksepa en Romo.

Reformoj.

La stato trovita necesigis reformojn ĉiuspecajn. La plej gravaj estis la internaj, kiuj alcelas atingi iom post iom sisteman, laŭ-plenan agadon komunan per eluzo de ĉiuj fortoj kunigeblaj. Ili baziĝas unue sur la unueco de ĉio, ligita kun absoluta disciplino kaj solidareco de ĉiuj eroj. Ni povas diri, ke tiurilate senteblaj progresoj estas faritaj. Sed ni estas nur je la komenco de la klopodo. Ekstreme grava estas la kunigo de ĉiuj fortoj, kiuj siaparte devas absolute adaptiĝi al la situacio, subordiĝi laŭnceese por la pli alta celo. Sen solidareco nenia demokratio. Demokratio signifas,

Polisce
 Oddział w Warszawie
 ul. Marszałkowska - 81m.32.

№ 271

ke la malplimulto submetiĝu al la plimulto. Preparoj estis faritaj por reformo de nia ekstera laboro. Ĝi estas ebla kaj fruktodona nur, se ĉiuj faktoroj praktikaj estas eluzataj. Nuntempe la fortoj en la movado ankoraŭ ĉiam estas tro dise uzataj, sed iom post iom—kaj spite al ĉiuj malfacilaĵoj de la epoko—nia asocio antaŭeniras. Ni tamen bezonas por ĉio la necesajn rimedojn kaj tempon. Nenia troa fervoreco povas pli rapidigi nin. Ni devas agi, senhalte, kontinue regule, sisteme kaj prudente. U.E.A. estas sur la ĝusta vojo, kiel montras la labor-rezulto de 1935. Se iuj estas malkontentaj, tio nur pruvas, ke ili ne konas la faktojn. Aŭ ke ili tro-taksas nian forton nunan. Por atingi pli, ni devas havi pli grandan forton. Ni devas laboregi por tio. Feliĉe nia asocio jam povas apogi sin sur kelkajn internajn fortojn, kiuj estas la ĝenerala kondiĉo por sukcesa daŭrigo. Tamen la cetera parto de la movado ankoraŭ estas regata de diletantismo danĝera aŭ de amatoreco ne tre rezistokapabla. Kiam en nia organizo la praktika laboro superos la amatoran, nia konstanta progreso estos certigita. Tiu ĉi realeco neniel vundigas la internan ideon de Esperanto. Tute kontraŭe, ĝi nur profundigas la sentojn, kiuj kunligas milojn da homoj en idealo. Ĝi inspiras la plej praktikajn homojn en niaj vicaj sinofere laboradi por celo nepre atinginda.

La Centra Oficejo.

Multaj konsideras la Centran Oficejon kiel nuran administran institucion. Ili image vidas skribmaŝinon, kelkajn helpantojn, plie sliparojn, registrojn k.a., la oficistojn laboras, ĉar ili estas pagataj ; kompreneble oni ankaŭ korespondas kaj klasigas leterojn. Nur tre limigita nombro da personoj komprenas kaj scias, ke la Centra Oficejo estas sufiĉe ampleksa, bone instalita kaj teknike ekipita laborejo, kian necese devas havi organizo tiel granda kiel la nia ; en kiu oni laboras sisteme, regule kaj senhalte pri ĉiuj teknikaj detaloj de la organizo. La reorganizo altrudis aron da plibonigoj, simpligoj kaj antaŭ ĉio pli racian arangon de la laboro. Ni ne povas citi detalojn tie ĉi. Ni povas nur diri, ke devis okazi fundamentaj ŝanĝoj, bone pripensitaj, temporabaj, sed esperigaj. Post unujara funkciado jam montriĝas la progreso. La C.O. tamen havas ankoraŭ aliajn taskojn. La plej grava estas la ekstera propagando. La transira periodo ne permesis fari ĉion, kion oni volis. La nuntempo cetere ne favoras grandajn entreprenojn. Sed en multaj okazoj la C.O. intervenis sukcese. Pri detaloj estis raportitaj en tiuj ĉi kolonoj. Ni konstante klopodas liberigi forton por la praktika laboro. La nuna direkcio devis akcepti ŝarĝon,

kiu ne estas portebla sen malfacilaĵoj. Krom la ekstera laboro ĝi devas okupi sin pri la administra parto, plie pri la interna marŝo de la organizo kaj fine ankoraŭ pri la vivnecesa organo oficiala. Antaŭe 3 personoj estis plene okupitaj pri tio. Kolosa laboro estis farita kaj certigita de la C.O. Por sekurigi ĝin ni tamen bezonas plian subtenon. Kreskanta helpantaro igos ĝin pli labor-kapabla, kaj tiu ĉi stato devas esti atingata laŭgrade.

Jarlibro 1935.

Kiam ni skribas tiujn ĉi liniojn presprovaĵo post presprovaĵo estas legata por la finpretigo de la Jarlibro 1935. La cirkonstancoj devigis nin al aperigo de nura suplemento al la eldono de 1934. Komence de la jaro unue financaj konsideroj kaŭzis prokraston de la elveno. Poste teknikaj malfacilaĵoj eksterordinaraj devis esti superataj. Devis okazi kompleta reorganizo de la laboro por prezenti efektive taŭgan eldonadon. La preparoj samtempe utilas por la estontaj eldonoj. Kun malfruo, tre bedaŭrinda, la membroj ricevos la nomitan suplementon. Sed ili ricevos ĝin bonorde en periodo en kiu, laŭ juĝo de la antaŭaj gvidantoj de la asocio, U.E.A. jam ne plu estas vivkapabla. Preparoj estas faritaj por certigi fruan elvenon de kompleta jarlibro en 1936. Dependos nur de la samideanaro, ĉu tiu ĉi intenco estas realigebla aŭ ne.

Financoj.

Jam estas konata la turere malfavora stato de niaj financoj, kiam la novaj gvidantoj ekkaptis la direktilon de nia ŝipo pereonta. Ni trapasis tre malfacilan jaron, eble la plej malfacilan de la asocio de post ĝia fondo. La severe daŭranta mondkrizo, politikaj okazintaĵoj eksterordinaraj kaj fido-krizo interne de la movado ekskuis la fundamenton de U.E.A. La enspezoj senteble reiris (en 1934 rdcf. sv. frk. 53.000.—, en 1935 nur rdcf. sv. frk. 41.000) kaj la ŝparoj atingis la limon ne-transpaseblan. La krizo instigis al formigro de aktivaj membroj al la klaso de simplaj membroj kiel montras la jena komparo :

Je la fino de la administra jaro, la 31 oktobro 1935 :

	HM	MJ	MA	MS	MH	DM	Sumo	SM
1934	60	2627	3412	381	48	195	6723	9862
1935	14	1841	2078	229	53	188	4403	11815

HM=Helpmembro ; MJ=Membro kun Jarlibro ;
 MA=Membro-Abonanto ; MS=Membro-Subtenanto ;
 DM=Dumviva ; MH=Membro-Honora ; SM=Simpla Membro.

Nur unu rimedo efika ekzistas en tia evoluo rilate la financojn : ŝparema mastrumado. Malgraŭ ĉiuj mal-facilaĵoj, spite al dormorabaj zorgoj, ni povis fermi niajn kontojn favore :

U.E.A. finis la jarkalkulon 1935 sendeficite.

Por la unua fojo en la financa historio de la asocio tia konstato povas esti farata. Ĉu estas necesa pli bona pruvo por montri, ke U.E.A. nun estas sur la ĝusta vojo ?

Projektoj kaj problemoj.

El niaj linioj rezultas, ke ni klopodis ekvilibri nian laborvolon kun la laborpovo. Nia horizonto estas multe pli vasta, sed ne estas dubo por ni, ke la realigo de pliaj ideoj dependas nur de laŭgrada pligrandigo de niaj kapablecoj. Komitato, estraro kaj direkcio de U.E.A. estas konstante okupitaj pri tiaj projektoj kaj problemoj. Kelkaj el ili tuŝas la vivon de la asocio ; sed mankas ankoraŭ la konsolidiĝo de la detaloj, la matureco.

Realaĵoj estas solveblaj nur per realaj faktoroj. Iuj esperantistoj timas la "tro komercan spiriton" kaj ili eraras per nura miskompreno pri praktika kaj ne-praktika agado. Aliaj kulpigas nian asocion pri ne-ago por difinita ideo, malkonante la detalojn pri kiuj ne ĉiam povas esti informata ĉiu membro. Bedaŭrindan opozicion, multparte pro personaj kaj principaj konsideroj, montras grupo da samideanoj, kiuj ankoraŭ ne plene konceptis la ideon de vera unueco. Ni povas nur esperi, ke faktoj iom post iom helpas al ilia kunigo en nia unueca fronto. En la gazetara demando, eĉ per minacoj, oni intencas altrudi al la nunaj gvidantoj de U.E.A. respondecon, kiun ili ne povas preni sur sin nuntempe. Pri la interligo de unu aŭ alia institucioj kun U.E.A. la proponantoj plene pretervidas, ke temas pri entreprenoj tute privataj, pri kiuj la movado havas nek kontrolon, nek plenan orienteblecon pri la vera stato. *Unue la vivo de U.E.A. mem devas esti sekurigita* antaŭ ol pli grandaj projektoj estas realigeblaj. Por tio ni bezonas kaj postulas absolutan fidon al la nunaj gvidantoj de U.E.A. Kaj tiun ĉi fidon vi plej efike pravas per daŭra subteno al nia senĉesa laborado kaj plenumante nian alvokon : Fariĝu aktiva membro de U.E.A. por 1936 !

Vi helpas ankoraŭ pli efike, se vi samtempe varbas aliajn esperantistojn kiel aktivajn membrojn de U.E.A.

ROBERT KREUZ.

JAR-BILANCO DE U.E.A. 1935

Jara spezo:

Enspezoj	<i>Svisaj frk.</i>	Elspezoj	<i>Svisaj frk.</i>
Kotizoj	26,474.69	Oficejo	3,433.25
Abonoj	121.15	Salajroj	17,290.00
Entrepreneoj	140.95	Materialo	843.30
Anoncoj " Esperanto "	771.88	Ĵurnalo	7,773.40
Anoncoj Jarlibro	422.84	Jarlibro	2,998.90
Patronaro	1,622.50	Presajoj	1,513.50
Partoprenantoj	150.00	Afranko C.O.	1,844.32
Simplaj membroj	4,970.30	Afranko ekstera	391.25
Kongres-licenco		Telefono, telegramoj, poŝtdepagoj	298.26
(Stockholm-Roma)	6,467.65	Premioj M.S.	567.05
		Vojaĝoj	114.05
		Lingva Komitato	400.00
		Ekstera Propagando	489.20
		Biblioteko	15.50
		Diversaj	980.40
		Gajno en adminstra jaro 1935	2,189.58
	41,141.96		41,141.96

Notu ! La gajno rezultis el ŝparoj (ekz. eldono de suplemento al la Jarlibro) ne efektiveblaj en estontaj jaroj. Vidu en raporton sur p. 13.

FERMA BILANCO DE U.E.A.

je la 31 oktobro 1935

(Saldoj)

1. Monoj :		
Kaso	176.71	
Svisa poŝtĉekkonto	869.51	
Fremdaj poŝtĉekkontoj	3,376.35	
Bankoj	811.14	
Disponebla mono :	5,233.71	
2. Kont-Havantoj	14,922.00	
3. Liverantoj	12,934.05	
6. Var-Kontoj :		
Provizoj (libroj kaj aliaj) ..	2,683.70	
7. Bilanc-Kontoj :		
Maŝinoj	2,350.00	
	<u>Sv. Frk. : 10,267.41</u>	<u>27,856.05</u>

Pasivoj : 27,856.05

Aktivoj : 10,267.41

Ŝuldo : Sv. Frk. 17,588.64

PERDO-GAJNO

Perdo administra jaro 1934 ..	50,011.43	
Diferenco administra jaro 1935 ..	2,189.58	
Pozicioj 1933-34 ne enskribitaj, amortizo kaj aliaj	159.25	
Dumjara Perdo-Gajno	4,915.96	
Administra Asocia Kapitalo ..	25,476.50	
	<u>Sv. Frk. 50,170.68</u>	<u>32,582.04</u>

Pasivoj : 50,170.68

Aktivoj : 32,582.04

Asocia ŝuldo : Sv. Frk. : 17,588.64

FUNDOJ DE U.E.A.

Laŭ la stato je la 31 oktobro, 1935

FUNDO DE ŜLOSILOJ (aparta bankkonto).

Bonhavo 1 julio 1935	4,347.65	
Diversaj enspezoj	27.55	
Saldo	4,375.20	
	<u>Sv. Frk. 4,375.20</u>	<u>4,375.20</u>
Bonhavo 31 oktobro 1935 :	Sv. Frk. 4,375.20	

PROPAGANDA FUNDO (aparta bankkonto).

Bonhavo 1 julio 1935	3,744.00	
Diversaj enspezoj	9.10	
Saldo	3,783.10	
	<u>Sv. Frk. 3,783.10</u>	<u>3,783.10</u>
Bonhavo 31 oktobro 1935 :	Sv. Frk. 3,783.10	



Statistiko laŭlanda de la Membraro de U.E.A. en 1935

Mallongigoj : HM=Helpmembro ; MJ=Membro-Jarlibro ; MA=Membro-Abonanto ; MS=Membro-Subtenanto ; DM=Dumviva-Membro ; MH=Membro Honora ; P=Patrono ; SM=Simpla Membro.

Landoj	Aktivaj Membroj.								SM
	HM	MJ	MA	MS	DM	MH	P	Sumo	
Albanujo	—	—	1	—	—	—	—	1	—
Aŭstrujo	—	10	19	1	1	2	—	33	—
Belgujo	—	49	132	10	3	1	1	196	266
Britujo	—	260	190	60	33	4	8	555	1,569
Bulgarujo	—	1	7	—	—	—	—	8	—
Cehoslovakujo	—	215	261	7	2	8	—	493	250
Danciĝo	—	4	1	1	—	1	—	7	—
Danujo	—	19	43	4	5	1	—	72	—
Estonujo	—	10	8	—	1	—	—	19	—
Finnlando	4	13	13	—	3	1	—	34	—
Francaĵo	—	354	256	19	28	12	2	671	3,094
Germanujo	—	217	234	27	18	5	1	502	570
Gibraltaro	—	—	1	—	—	—	—	1	—
Greklando	—	4	9	—	1	1	—	15	—
Hispanujo	—	62	71	4	7	2	—	146	1,003
Hungarujo	5	23	36	1	1	—	—	66	—
Irlando	—	6	1	—	—	—	—	7	—
Islando	—	—	1	1	—	—	—	2	—
Italujo	—	12	41	6	5	3	—	67	—
Jugoslavujo	—	18	48	3	—	—	—	69	—
Latvujo	—	13	17	2	2	—	—	34	—
Lihtenŝtejno	—	—	1	—	—	—	—	1	—
Litovujo	—	1	13	1	—	—	—	15	—

Landoj	Aktivaj Membroj								SM
	HM	MJ	MA	MS	DM	MH	P	Sumo	
Monako	—	7	—	—	—	—	—	7	—
Nederlando	—	260	162	33	9	3	1	468	1,300
Norvegujo	—	3	9	1	3	1	—	17	—
Polujo	—	41	35	2	3	1	1	83	—
Portugalujo	—	5	34	2	1	—	—	42	—
Rumanujo	1	38	21	—	2	—	—	62	—
Sovet-Unio	—	—	2	—	3	—	—	5	—
Svedujo	1	34	43	1	1	1	—	81	2,369
Svislando	—	50	61	10	15	4	—	140	400
Eŭropo	11	1,729	1,771	196	147	51	14	3,919	10,821
Afriko	—	16	30	1	2	1	—	50	—
Kanado	—	4	8	—	3	—	—	15	—
Usono	2	19	88	13	22	1	—	145	94
Centra Ameriko	—	—	4	—	2	—	—	6	—
Suda Ameriko	1	19	28	10	1	—	—	59	500
Azio	—	40	91	7	7	—	—	145	400
Aŭstralio	—	10	39	2	1	—	—	52	—
Nov-Zelando	—	4	19	—	3	—	—	26	—
Ekster Eŭropo	3	112	307	33	41	2	—	498	994
Eŭropo	11	1,729	1,771	196	147	51	14	3,919	10,821
Ekster Eŭropo	3	112	307	33	41	2	—	498	994
Stato 31.10.35	14	1,841	2,078	229	188	53	14	4,417	11,815

Tuta Membraro 1935—16,232.

PATRONARO 1935

D-ro A. Zamenhof, Varsovio	Polujo
F-ino Aalders, s'Gravenhage	Nederlando
S-ino Mary C. Gillett, Banbury	Britujo
S-ro T. J. Gueritte, Surbiton	„
S-ro W. E. Clayton, London	„
F-ino F. M. Bartholomew, Letchworth	„
S-ro Enrique Legrand, Montevideo	Urugvajo
S-ino Morris, Bruxelles	Belgujo
S-ro H. Dresselhaus, Schlose Holte	Germanujo
S-ro M. Générmont, Moulins	Francujo
F-ino Isabel C. Fortey, Croydon	Britujo
S-ro Willi Zeidler, Berlin	Germanujo
S-ro Rollet de l'Ile, Paris	Francujo
S-ro Aron, Königsberg	Germanujo
S-ino L. Høst, København	Danujo
S-ro C. Jakob, Arnhem	Nederlando
F-ino E. A. Sidebottom, Ipswich	Britujo
S-ro F. L. Wharff, Berkeley	Usono

HONORA MEMBRARO DE U.E.A.

Membroj Honoraj estas distingitaj de la Komitato per tiu titolo, pro gravaj servoj aŭ donacoj faritaj al U.E.A. aŭ al la Esperanto-movado. Ili ne pagas kotizon. (Statuto, Art 11)

S-ro Justin Godart, Franca Ministro por Saneco
S-ino Emilie Hodler-Ruch, vidvino de Hector Hodler,
kunfondinto kaj prezidinto de U.E.A.

S-ro Georges Baire, Boulogne-sur-Mer (Francujo)
S-ro André Baudet, Paris (Francujo)
S-ro Walter Bell Currie, Burnley (Britujo)
S-ro Paul Berenguier, Toulon (Francujo)
S-ro P. Blaise, Komitatano de U.E.A.
S-ro Louis Bouvier, Poix, Somme (Francujo)
S-ro Charles H. Briggs, Minneapolis (Usono)
S-ro Antonio Carbonell y Bosque, Alcira (Hispanujo)
S-ro Charles Brunet, Bordeaux (Francujo)
S-ro Prof. Odo Bujwid, Kraków (Polujo)
S-ro Oscar Bünemann, Hamburg (Germanujo)
S-ro Prof. Christaller, Stuttgart (Germanujo)
S-ro Charles Cresp, Cannes (Francujo)
S-ro Andreo Cseh, s'Gravenhage (Nederlando)
S-ro Th. Čejka, Bystřice pod Hostýnem (Ĉeĥoslovakujo)
S-ro Ernest Deligny, Saint-Omer (Francujo)
S-ino Alice Farges, Lyon (Francujo)
S-ro Eugene Gabert, Saint-Etienne (Francujo)
S-ro J. Garzon Ruiz, San Fernando, Cadiz (Hispanujo)
S-ro Emile Gasse, Le Havre (Francujo)
S-ro M. Générmont, Moulin-sur-Allier (Francujo)
F-ino Gabrielle Gérard, Paris (Francujo)
S-ro F. A. Goodliffe, Horsham (Britujo)
S-ro Paul Gottgetreu, Hanover (Germanujo)
S-ro Albert E. Hepton, Hull (Britujo)
S-ro Henry W. Hetzel, Philadelphia (Usono)
S-ro F. W. Hipsley, Wolverhampton (Britujo)
S-ro W. H. Hirst, Huddersfield (Britujo)
S-ro Rud. Hromada, Praha (Ĉeĥoslovakujo)

S-ro Alberic Humez, Douai (Francujo)
 S-ino Julia Isbrücker, s'Gravenhage (Nederlando)
 S-ro J. R. G. Isbrücker, s'Gravenhage (Nederlando)
 S-ro Charles Jayet, Morges (Svislando)
 S-ro Joh. Karsch, Dresden, (Germanujo)
 S-ro Bernhard Kötz, Leipzig (Germanujo)
 S-ro Antonín Kudela, Olomouc (Ĉeĥoslovakujo)
 S-ro Stefano Kunerth, Merano (Italujo)
 S-ro Herm. Kürsteiner, Sankt Gallen (Svislando)
 S-ro Armand Landenne, Huy (Belgujo)
 S-ro Paul Linares, Cordoba (Hispanujo)
 S-ro Stefano La Colla, Palmero (Italujo)
 S-ro M. Rollet de l'Isle, Paris (Francujo)
 S-ino M. Magnus-Focké, Orléans (Francujo)
 S-ro Auguste Martin, Mâcon (Francujo)
 F-ino Margarete Noll, Köbenhavn (Danlando)
 S-ro Paul Nylen, Huddinge (Svedujo)
 S-ro William M. Page, Edinburgh (Britujo)
 S-ro Donald E. Parrish, Buffalo (Usono)
 S-ino Marthe Petit, Dijon (Francujo)
 S-ro D-ro Augustin Pitlik, Praha (Ĉeĥoslovakujo)
 S-ro Augustin Ploussu, Grenoble (Francujo)
 S-ro D-ro Edmond Privat, Locarno (Svislando)
 S-ro Claudius Vincent Richard, Tanger (Maroko)
 S-ro Vilho Setälä, Helsinki (Finnlando)
 S-ro O. Sklenčka, Hradec Králové (Ĉeĥoslovakujo)
 S-ro François Soubranne, Tulle (Francujo)
 F-ino Julia Šupířhová, Praha (Ĉeĥoslovakujo)
 S-ro D-ro Anakreon Stamatiadis, Athènes (Greklando)
 S-ro Hofrat Hugo Steiner, Wien (Aŭstrujo)
 S-ro Georges Stroele, Neuchâtel (Svislando)
 S-ro St. Szabunievicz (Ruslando)
 S-ro Hans Tressel, München (Germanujo)
 S-ino Anna Tuschinski, Danzig
 S-ro P. J. Vermaas, Rotterdam (Nederlando)
 S-ro D-ro Eugen Wüster, Wieselburg (Aŭstrujo)

DUMVIVA MEMBRARO

Personoj fariĝintaj Dumvivaj Membroj konforme al la regularo, kiu valoris de 1910 ĝis Oktobro 1912. La personoj kun * estas samtempe Garantiantoj.

Bünemann, Paul, Patras	Linares, P., Cordoba *
Camescasse, J., Les Bordes*	S-ino Milsom, Genève †
Dainelli, P., Genova	Szulz, S., Bydgoszcz
Fasce, E., Genova	Stojan, P., Blausac-Escarène
Hipsley, F.W., Wolverhampton	Stromboli, A., Firenze
Lewis, F. H., Gawler	Vaughan, R., Sandakan

DUMVIVA MEMBRARO

(1913 ĝis 1920)

Aae, S., Horsens	Bünemann, O., Hamburg
Aleman Ruiz, A., Habana	Buret, H., Pussay
Alksnis, J., Riga	Buŝujev, J. A., Moskvo
Allende, V. O. de, Bilbao	Camescasse, J., Les Bordes
Altenstadt, G., Antwerpen	Camuffo, A., Trieste
Amundsen, F-ino J., Oslo	Carles, A., Beziers †
Arnhold, D-ro H., Dresden †	Carter, R., Bootle †
Babcock, A. H., Inverness	Chandellier, C., St. Julien
Bacquet, J., Lille	Chilard, L., Versailles
Barnes, C. E., Brackley	Christen, A., New York City
Bartholomew, F-ino E. M.	Clark, G. F. H., London
Bartholomew, F-ino F. M., Letchworth	Cohendy, E., Lyon †
Bayes, W., Hove	Coté, G. H. W., Utrecht †
Bevan, W., Seacombe †	Cottrell, F. G., Washington
Bicknell, Cl., Bordighera †	Coxe, H. R. H., London
Blackett, E. R., Bath †	Dalmau, J. D. J., Barcelona
Blicher, S-ino L., Köbenhavn	Daingerfield, W. R., Oakland
Bonnier, M., Lyon	Delanoue, G., Levallois
Boon, F-ino N., Hago	Didrichson, V., Odessa †
Bostona Esperanto-Societo	Dietl, W. E., Baden b. Wien
Bredall, J., Croydon †	Dinslage, J. F., London
Brunet, C., Bordeaux	Donker, H. S., Amsterdam
Buchanan, G. D., Glasgow	Doré, F., Troyes †
	Doré, S-ino L., Troyes

Ehnis, E., Mexico	Isstel, L., Wiesbaden †	Moutinho, A., Meda	Sandelyon, A., Lyon †
Elten, E., Hildesheim †	Jazdani, A., Teheran	Mudie, H., Bolingbroke †	Schacht, P., Černauti
Etard, J., Rouen †	Johnson, E. B., Guildford	Mulert, A., Zweibrücken	Schiff, L., Berlin
Fairman, C. A., London	Jonides, C. A., Hove †	Muribö, M., Bekkelagshöiden	Schilling, E., Bern
Fallek, E., Paris	Kawecki, Wl., San Francisco	Newcomb, L. F., Cochane	Schoofs, F., Antwerpen †
Farges, S-ino A., Lyon	Koch, A., Luck	Nix, J. P., Romsey	Sébert, Generalo H. †
Farmer, H. F., London †	Koposov, V. A., Simbirsk †	Norvega Esperanto-Ligo	Sevilja Esperanto-Grupo
Finholdt, F-ino J., Oslo †	Krassovskij, N. B., Minusinsk	Nowell, H. N., Sandwich	Sharpe, R., Torquay †
Fleck, F., München †	Krestanoff, I. H., Sofia	Oliveira, Marques, Lisboa	Shidani, B., Teheran
Forestier, J., Genève †	Laarschot, v. d., Bussum	Omlor, E. A., St. Ingbert	Silbernik, J., New York †
Fréchet, M., Paris	Lageste, F., Dax †	Pätiälä, H. J., Vaasa	Šimonek, D-ro B. L. †
Freneckell, K. v., Dresden	Lahens, Paris	Parker, H. C., Auckland †	Sing, P., Kreuzlingen
Frost, L. C., Los Angeles	Leroudier, H., Lyon	Pearson, M., Sheffield	Smith-Clough, J., Folkestone
Gabert, E., St. Etienne	Letord, Aïn-Sefra †	Peckover, P. H., Wisbech †	Šmurlo, W. von, Riga †
Gale, W. A., Herne Bay †	Lhermitte, J., Paris	Pedrazzini, S., Locarno	Snider, J. W., Walthonding
Gandell, T. P., London †	Linares, P., Cordoba	Petit, S-ino M., Dijon	Soriano, T., Sevilla †
Giersberg, S-ino, Berlin †	Lochhead, J. F., Baden †	Phillips, E. G., London	Soulter, D-ro H., Lyon †
Gieseler-Fischer, W., Berlin	Lucas, F., Chemnitz	Pinagel, V., Bonn a. Rh.	Steckiewicz, M., Kielce †
Gillett, S-ino, Banbury	Lukáš, M., Trnava	Pino, A., Valencia	Stettler, Ed., Bern
Goedecke, A., Sönderborg	MacCallum, Paisley	Pitt, W., Bath †	Svisa Esperanto-Societo
Goemans, H., Istanbul	Maclean, N., Aguilas †	Poensgen, H., Solingen	Szabuniewicz, S., Moskvo
Goodliffe, F. A., Horsham	Madlener, H., Gaustadt	Pointer, S-ino M., St. Neots	Szentmariay, D. †
Gouchon, M., Lyon	Maksimov, V., Kutais †	Pollen, D-ro J., London †	Szentmariay, E. †
Graeger, O., Magdeburg †	Mallet, E.	Poncet, D-ro L., Bourg (Ain)	Tagliaferri, A., Buenos Aires
Grineva, S-ino A. †	Maraury, R., Madrid	Priestman, A. T., Bradford †	Tamke, F-ino O., Bargstedt
Harris, W. H., Lampeter	Marchand, W., Princeton	Prinz, D., Bekkelagshöiden	Tiard, S-ino M., Paris †
Hay, A., Wallasey	Marriott, R. †	Privat, D-ro Edm., Locarno	Tissot, S-ino L., Basel
Hechtl, J., München †	Marseille, C., Paris	Ragnell, S-ino, Luopioinen	Tsuji, R., Osaka
Herlemont, H., Paris	Maske, R., Rogozno †	Raven-Hart, R., La Ciotat	Vermaas, P. J., Rotterdam
Hetzel, W. H., Philadelphia	Maya, E. de, Lisboa †	Richardson, Washington	Vörös, D-ro C., Budapest
Hilding, G. W. R., Hartford	Mazzuconi, A., Buenos Aires †	Rifling, B. †	Waldmann, A., Lyon †
Hirzel, F., Schaffhausen	Megahy, B. P., Preston	Rishkov-Hakejev, Kursk	Warden, J. M. †
Hodler, H., Genève †	Millan-Alonso, Madrid	Rockman, F. (Eksigis)	Wengler, E., Berlin †
Holmes, J. T., Torquay	Milner, F-ino, Leek	Rodionov, A., Baku †	Wilson, J., Leek †
Huttin, H., Bourg en Bresse	Moody, R. H., Bicester †	Rollet de l'Isle, M., Paris	Wohlgrath, F., Genève †
Indra, T., Riga	Moscheles, F., London †	Roseboom, D-ro †	Zündel, F-ino M., Bern †
Israelsen, M., Frederiksund	Moser, F., Rüegsau †	Rumsey, E. M., Salem †	

Stato : Aliĝis ĝis fino 1919 al la unua parto de la Garantia Kapitalo 194 garantiantoj, el ili 190 personoj kaj 4 societoj. Je la 30-a de Aprilo 1936 la nombro de garantiantoj estis 126, inter ili 4 societoj.

(1921 ĝis 1934)

Aalders, F-ino, Rijssen	Huber, M., Paris
Allan, T. A., Toronto	Huysmans, J. J. W., Bruxelles
Alonso-Sanz, V., Madrid	Iffländer, H., Breslau
Benšahar, J., New York	Ireland, E. B. †
Bierhoff, F., Kreuzlingen	Jaffe, S. J., Detroit
Bouillat, D-ro, Madagaskar	Jakob, Yvonne, Genève
Bouvier, P., Genève	King, W. H., Wellington
Boyer, A., Cannes	Magnus, S-ino M., Orléans
Bünemann, S-ino, Hamburg	Mees, S-ino W., Laren
Cather, C. M., Port Saïd	Meihuizen, D-ro P. W., Arnhem
Champy, F-ino A., Antwerpen	Morris, S-ino, New York
Chi, J. S., Peiping	Odiorne-Gleason, Worcester
Chitty, W., Dover	Parrish, D. E., Buffalo
Clegg, R. I., Chicago †	Parry, W. E., Hove
Coeverden, F. C. C., Diepenveen	Pentermann, G. S., Rotterdam
Crowley, R. H., Welwyn	Popper, H., Böhm.-Kamnitz
Culver, F-ino J., U.S.A.	Potts, B., Wellington
Daglio, Cl., Alessandria	Pratley, P. L., Westmount
Doorne, C. van, Rotterdam	Pruidze, Teodoro, Alpana
Dust, L. E., Wellington	Rehmann, Alfred, Genève
Dziedzic, D-ro Ignacy, Torun	Roscoe, N. K., Sth. Croydon
Fischer, H., Bucuresti	Sievers, H.
Fulda, D-ro Rob., Berlin	Sigel, D-ro T., Detroit
Gila, C., Locarno	Spindler, D-ro, Touques
Ginsburg, J., Kfar Yonah	Tanigaki, T., Osaka
Grüntal, J., Haapsalu	Taylor, C. S., Haverford
Hammer, H., Zürich	Vesterinen, Hj., Tampere
Henry, S-ino J. B., Fairfield	Vinzent, S. A., Oakland
Hindmarsh, H. K., Laivasha	Williams, D-ro Fred J., Papua
Hoffmann, P., Schweiklberg	Winberg, C., Bengtsfors
	Young, E. A., Balbao Height

(Stato : 30-4-36 : 61 DM dua serio. El ili 2 †. Sekve restas 59.)

NIAJ MORTINTOJ

Dum la jaro 1935 la morto forprenis el niaj vicoj la jenajn samideanojn :

Aeby, Fern., Mulhouse, Francujo.

Allen, D-ro Louis, de la Universitato de Toronto (Kanado), en Septembro 1935 dum vojaĝo en Francujo. Nia movado kaj U.E.A. perdas en li eminentan, ĉiam aktivan batalanton por Esperanto.

Arnhold, S-ro Konsulo D-ro jur. Heinrich, en Dresden. 10 Oktobro 1935. Li multe helpis antaŭenpuŝi Esperanton en idealaj kaj praktikaj kampoj. Li dumtempe estis kasisto de G.E.A. kaj prezidanto de la Saksa Esperanto-Ligo. Post la milito li estis membro de la Konstanta Reprezentantaro de la Naciaj Societoj (K.R.), en kiu li reprezentis la Germanan Esp. Asocion. Li estis membro de la Lingva Komitato kaj, dum multaj jaroj, li estis patrono de la iama I.C.K. U.E.A. nomis lin pro liaj meritoj Honora Membro de la Asocio.

Aubry, S-ro F., Le Havre, Francujo.

Behrendt, Arnold, en Berlino, 24 Februaro 1935. Li estis unu el la plej bonaj batalantoj por nia afero en Germanujo. Li fariĝis Esperantisto en 1908, kaj poste li senhalte, diligente, kaj serioze agadis por Esperanto, aparte en la poŝta kampo. Li estis aŭtoro de E.-lernolibroj, kaj verkis multajn literaturajojn. Li estis L.K.-ano, kaj la prezidanto de la 25a (jubilea) Kongreso en Kolonjo.

Bergsted, F-ino Anna, Vahlbäk, Näsinge. Del. U.E.A. 10 Junio 1935.

Blaise, S-ino Margaret Lily, en Londono, 5 Augusto, 1935. De 1906 ĝis ŝia morto ŝi instruis Esperanton en diversaj vesperlernejoj. En 1910 ŝi edziniĝis kun S-ro Paul Blaise, multjara komitatano de U.E.A. Ŝi fondis kaj tri jarojn prezidis la Federacion de Lancashire kaj Cheshire.

Ŝi verkis la lernolibron *The Esperanto Manual*. En 1925 ŝi predikis en la Katedralo de Genevo. En 1928 ŝi fondis la Duadimanĉan Rondon, kiu nun fariĝis rimarkinda centro de la Esperanta vivo en Londono. Ŝi estis membro de la Lingva Komitato, kaj ĝiskore ano de la interna ideo de Esperanto. U.E.A. perdis en ŝi multjaran kaj honorindan membron.

Cuadra, S-ro Luis E. Sepulveda, Santiago de Ĉilo, 30 Oktobro 1935. Li estis unu el la unuaj samideanoj en Suda Ameriko, kaj lia biblioteko estis sendube la plej valora kolekto de esperantaĵoj en tiu kontinento. Li estis L.K.-ano de multaj jaroj, kaj senlaca propagandisto.

Dombovitz, S-ro Harris Hyman, Del. U.E.A. Malakoff, Francujo.

Došek, S-ro Dragutin, Delegito de U.E.A. en Bjelovar, Jugoslavujo.

Droste, S-ro A. P. G., Hillegersberg, Nederlando, 21 Oktobro 1935.

Fauchart, S-ro, Delegito en Vervins. Fervora kaj konstanta propagandisto.

Fries, S-ro Louis, Mulhouse.

Fruteau, S-ro., Neuilly-Plaisance (Seine).

Gérard, S-ino Emile, 9 Julio 1935. Patrino de F-ino Gabrielle Gérard, Paris, Honora Membro de U.E.A.

Gerke, S-ro Heinrich, Bremen, 25 Marto 1935. Delegito kaj malnova membro de U.E.A.

Hartog, S-ino Hedwig, Hannover, 4 Februaro 1935. Malnova membro de U.E.A.

Hein, S-ro A., Hannover, 2 Septembro 1935.

Holtorg, S-ro Gustav, Burg-i-Dithm, Germanujo. Del. U.E.A. 6 Novembro 1935.

Jammes, Prof. Fernand, Del. U.E.A. le Puy en Velay.

Korzlinskij, S-ro N. V., en Königstein, Germanujo. Li estis dum multaj jaroj prezidanto de la Moskva Societo Esperantista. Al lia laboro apartenas la kunverkado, redaktado, kaj eldono de la Plena Rusa-Esperanto Vortaro, aperinta en Moskvo en 1910.

Kubásek, S-ro Emanuel, Plzen, malnova membro kaj Del. U.E.A. 18 Julio 1935.

Kunz, S-ro Otto Ed., Thun, Bern.

Leakey, S-ro James, Hatfield, Anglujo. Delegito de U.E.A. Marto 1935. Tre fervora propagandisto kaj aŭtoro de anglalingva lernolibreto por Esperanto.

Medrea, S-ro Iohano, Sighisoara, Rumanujo.

Meeter, F-ino D., Soest, Nederlando. Del. U.E.A. Oktobro 1935.

Modoo, S-ro M., Haarlem. Novembro 1935.

Mojado, Pastro Mariano, Madrid. 22 Aprilo 1935.

Morariu, S-ino Ireneo, Cluj, 15 Aŭgusto 1935. Patrino de F-ino Eugenia Morariu, nia Ĉefdel. por Rumanujo, kaj de S-ro Tiberio Morariu, Svedujo.

Pent, S-ro Ed., Pärnu, Estonujo. 11 Julio 1935.

Plantier, D-ro L., Annonay, Francujo.

Poljanskij, D-ro S. F., en Leningrado. Li estis kunlaboranto de multaj unuajperiodaj Esperantogazetoj. Dum sia tuta vivo li multe propagandis la lingvon.

Rebouillon, S-ro Joseph, Marseille, malnova amiko de U.E.A.

Richet, Prof. Charles, Parizo, Decembro 1935. Li estis unu el la plej grandaj scienculoj de Francujo, kaj en 1913 li ricevis la Nobel-premion por Medicino. Li fariĝis varma amiko de Esperanto, kaj en verkoj kaj artikoloj defendis ĝin. Du el liaj verkoj estas tradukitaj en Esperanton.

Rogler, S-ino Irma, Köflach, Stirio, edzino de nia Delegito Willibald Rogler. Ŝi estis tre vigla samideanino kaj kondukis kun sia edzo en 1920 infantransporton el Aŭstrujo al Barcelono

Stephens, S-ro F. R., Arden, Usono. Del U.E.A. 16 Junio 1935.

Sturge, Wilson Henry, Birmingham, 4 Marto 1935. Al nia movado li varbiĝis dum la milito, kaj kiel Vicdel. de U.E.A., Patrono de I.C.K., kaj Vicprez. de la Kvakera Esperantista Societo, li aktive subtenis ĝin.

Seidenberg, S-ro Joh. Andr., Köln, Patrono de I.C.K.

Zündel, F-ino Marta, Bern, 28 Marto 1935. Dumviva membro de U.E.A., onklino de nia Hon. Prezidanto, S-ro Ed. Stettler.

JOHN MERCHANT

S-ro John Merchant mortis en Sheffield la 9 Januaro 1936 en aĝo de 64 jaroj. La brita kaj la internacia movado perdis unu el la plej elstaraj personoj de la movado de post 35 jaroj.

Al Esperanto li aliĝis en 1905 kaj tre aktive agadis en la enlanda movado en Britujo. De 1922 ĝis 1931 li prezidis la Britan Esperantistan Asocion. Ĉe starigo de la Konstanta Re prezentantaro de la Naciaj Societoj (K.R.) en 1922, li fariĝis ties prezidanto, kaj per tio eniris la internacian gvidadon de la movado. En 1928 li estis elektita kiel prezidanto de la Internacia Centra Komitato de la Esperanto-Movado, kiun li modele estris ĝis 1933. Lia agado estis kronita per "La Interkonsento de Kolonjo," kiu donis la bazon al la unueca organizo por kiu li batalis konstante. Privataj kaŭzoj devigis lin retiriĝi. En Stokholmo, en 1934, post la rezigno de S-ro Ed. Stettler, li estis unuanime elektita prezidanto de U.E.A. Sed la samaj kaŭzoj devigis lin rezigni pri ofico, kiun li certe estus volinta plenumi per la tuta amo kaj konvinko lin liganta kun Esperanto.

Formortis ĝentilhommo kun ora koro, sed la memoro pri li restos eterne en ni por modelo. Prave citis la pastro, okaze de lia kremacio, la parolon: "Viro forlasis la vivon, kiu vivis por la bono de siaj kunhomoj."

ROBERT KREUZ

En la nokto de la 31 Januaro al 1 Februaro 1936 mortis post mallonga malsano la direktoro de U.E.A., S-ro Robert Kreuz.

Entuziasma Esperantisto jam en 1909, li dediĉis sian tutan liberan tempon al la movado, kaj baldaŭ post la mondmilito li multe helpis al la revivigo de la movado en Germanujo.

En 1923 li forlasis sian postenon ĉe industria entrepreno, kaj akceptis kunredakti la gazeton "Esperanto Triumfonta" (la antaŭa titolo de "Heroldo de Esperanto"). Li estis kunlaboranto de multaj Esperanto-gazetoj, kaj verkis plurajn vortarojn kaj broŝurojn pri diversaj Esperanto-problemoj.

En 1925 li fariĝis ĝenerala sekretario, en 1930 direktoro de la Internacia Centro Komitato, post la Interkonsento de Kolonjo dua direktoro de U.E.A., depost la Stokholma Kongreso la sola direktoro de U.E.A. kaj samtempe la redaktoro de la revuo "Esperanto."

Lia sperteco en organizaj demandoj, lia multlingveco, kaj lia eksterordinara stenografa lerteco faris lin plej meritplena gvidanto kaj organizanto de niaj Universalaj Kongresoj.

POPULARA ESPERANTO - BIBLIOTEKO

Bonaj libroj, bele eldonitaj kaj binditaj, prezo nur 3ŝ. 6p. plus afranko 6p.

La jenaj libroj jam aperis :

1. **LA VIRO EL FRANCUJO.** Ivans (W. Versteeg Graftdijk).
2. **QUO VADIS** (Vol. I). H. Sienkiewicz (Lidja Zamenhof).
3. **QUO VADIS** (Vol. II). H. Sienkiewicz (Lidja Zamenhof).
4. **ŜI.** Rider Haggard (G. J. Degenkamp).
5. **FANNY.** Edna Ferber (Berno Fabo).
6. **RIĈA KAJ SEN MONO.** E. P. Oppenheim (F. E. Wadham).
7. **LA ORA ŜTUPARO.** E. P. Oppenheim (Romford Esp. Societo).
8. **LUNO DE IZRAEL.** Rider Haggard (Payson kaj Butler).
9. **PINOKJO.** C. Collodi (M. Marchesi).
10. **LA DORMANTO VEKIĜAS.** H. G. Wells (A. F. Milward).
11. **PETROLO** (Vol. I). Upton Sinclair (W. Bailey).
12. **PETROLO** (Vol. II). Upton Sinclair (W. Bailey).

Venonta titolo estas :

13. **LA AVENTUROJ DE MARTENO DRAKE.** G. Norway (W. Severn) (Okt., 1936).
Aliaj sekvos po du dum ĉiu jaro.

Eldonitaj de

THE ESPERANTO PUBLISHING COMPANY Ltd.

Aĉeteblaj ĉe

BRITA ESPERANTISTA ASOCIO

142 HIGH HOLBORN, LONDON, W.C.1

KAJ ĈIU ESPERANTA LIBROVENDISTO

ESPERANTISTA LINGVA KOMITATO KAJ AKADEMIO

Prezidanto :

M. Rollet de l'Isle, ⁵Paris.

Membroj de la Lingva Komitato:

Alberich Jofrè, S., Perez Galdós, 45, Barcelona.

Andrejev, A. P., Spiridonovka N 15, ekspedejo "Esperanto," Moskva, I. U.S.S.R.

Archdeacon, Ernest, sursipe de "Jahito Esperanto," Quai Carnot, St. Cloud, Seine-et-Oise (Francujo).

Aymonier, Camille, 34 Allées Damour, Bordeaux, Gironde.

Backheuser, D-ro E., Caixa postal 2494, Rio de Janeiro.

Baghy, Julio, Rottenbiller ut. 66, I, 20, Budapest VII.

Bailey, Th. G., Laganville, Nether Street, London, N.3.

Bailey, W., Mara Domo, Glan-y-Mor Road, Penrhyn Bay (Caernarvonshire, Britujo).

Baird, F-ino Jane, 95 Bellevue Road, Edinburgh (Skotl).

Bastien, Louis, 116 Rue de Vaugirard, Paris VI.

Belmont, Leon, Marszalkowska 97a, Warszawa (Polujo).

Bennemann, Paul, Tiefestr. 5, Leipzig-C. 1.

Bianchini, P. J., Cimpello de Pordenone (Friuli, Italujo).

Blicher, M., Hollænderdybet 2. 4. København 5 (Danlando).

Blok, H., Amstelaan 55, Amsterdam (Nederlando).

Bobin, M., 80 Rue de la Tour, Paris XVIIe.

Bodo, K., Szabolcska Mihaly ucca 18, fsz. 2, Budapest I.

Bofill, M., Granada, N., Sindicato 188, I ero, Palma de Mallorca.

Boucon, H., 10 Boulevard du Lycée, Annecy, Haute-Savoie.

Bremon y Masgrau, D-ro J., Balmes 102, Barcelona.

Bugge Paulsen, R. E., Schivesgate 4-I, Oslo (Norvegujo).

Bulthuis, H. J. Kamillestraat 37, s'Gravenhage (Nederlando).

Bunemann, Oskar, Isestr. 79, II, Hamburg 37 (Germanujo).

Butler, Montagu C., 36 Penrhyn Road, Kingston-on-Thames (Surrey, Anglujo).

Chavet, Gabriel, Rue Gauthier de Chatillon 6, Lille.

Chrillater, Paul, Prof., Neue Weinsteige 61, Stuttgart (Germanujo).

Cogen, Léon, 52 Drève, Ninove (Belgujo).

Corret, D-ro P., 197 Boulevard Brune, Paris XIV.

Couteaux, D-ro J., Hôpital Cochin, 27 Fbg. St. Jacques, Paris XIV.

Cseh (Ĉe), Andreo, Oostduinlaan 32, s'Gravenhage.

Czubrynski, D-ro A., Sienkewicza 53, m.8, Ostrowiec Kielecki (Polujo).

Dalmau, Delfi, 245 Valencia, Barcelona (Hispanujo).

Deligny, Ernest, 4 Rue Allent, St. Omer (Francujo).

Demidjuk, G., Degtjarnij per. 5, kv. 6, Moskva 6.

Diez, F., Zurbaran, 9, Begona, Bilbao (Hispanujo).

Döhler, D-ro W., Gutenbergstrasse 24, Riesa-Elbe (Germ.).

Dombrowski, A., Rotušės Aikšte 6, Kaunas (Litovujo).

Domingues, D-ro C., Avenida Marechal Floriano 212-I, Rio de Janeiro.

Dreher, L., Starowislna 37, Kraków (Polujo).

Dresen, F-ino Helmi, Postkast 6, Tallinn (Estonio).

Drezen, Ernesto, Skatertrni 3, kv. 5, Moskva 69 (U.S.S.R.).

Ellerbeck, D-ro Ing. L., Bayerische Str. 31, Berlin, W.1.

Ellersiek, F., Wilmsstr. 5, Berlin, S.W.61.

Esselin, A., 10 Place Vintimille, Paris, IX.

Fischer, Henriko, str. D. Istrate, 10, Bucuresti.

Ghezzo, D-ro A., Via Montecucco 6, Trieste, (Italujo).

Grau Casas, Jaume, Casanova 155, Barcelona (Hispanujo).

Grenkamp-Kornfeld, S., 117 Bd. Jourdan, Paris XIV.

Harvey, W., Craighill Gardens 1, Edinburgh (Skotlando).

Heilker, P., Hoofddorp (Nederlando).

Hodakovski, T., gimn. prof., Legjonow 17, Nowy Sacz (Polujo).

Hohlov, N., Marjino 22, Moskva 75 (U.S.S.R.).

Hromada, Rudolf, Socharska 333, Praha VII.

Inglada, V., Prof., Escuela superior de Guerra, Chinchilla, 2, Madrid.

Isbrücker, J. R. G., Oostduinlaan 32, s'Gravenhage (Nederlando).

Jansson, Sam. Sjn, Slogen 23, Lidingö I. (Svedujo).

Jung, Teo, Brüsseler Str. 94, Köln a. Rh. (Germanujo).
 Ĵirkov, L., Trubnikovski per. 26, Lĝ. 8, Moskva 69.
 Kalocsay, D-ro K., Mária u. 34, III, 4, Budapest VIII.
 Kamaryt, Prof. D-ro. Stan., Zochova 3, Bratislava (Ĉeĥosl.)
 Karolczyk, S., Eska, Marszalkowska 60, Warszawa (Polujo).
 Kawasaki, Naokazu, 409 Hamagutityô Sumiosi-ku, Osaka (Japanujo).
 Kenn, Won, Prof. D-ro P.O. Box 88, Canton (Ĥinujo).
 Kenngott, Prof. A., University of Texas, Austin (Texas).
 Kostecki, J., Karłowicza 17m., Warszawa (Polujo).
 Krestanoff, Ivan, ul. 6 Septemvri 2, Sofia (Bulgarujo).
 Kühn, E., Secretario de la Legación Checoslovaca, Santiago de Chile (Ĉilo).
 La Colla, Stefano, Via Dandolo 24, Roma.
 Laignier, M., 30 Rue Dupont-des-Loges, Nancy (Francujo).
 Lajarte, R. de, 4 Villa d'Orléans, Fontenay-sous-Bois, Seine.
 Lejzerowicz, J., Skwerowa 20, Lodz (Polujo).
 Lippmann, D-ro W., Leibnizstrasse 13, II, Leipzig.
 Lundgren, John, Hedemora (Svedlando).
 Migliorini, D-ro Bruno, Via Alessandro Poerio 33, Roma 144. Dum la lerneja periodo : ĉe " Université de Fribourg," Fribourg (Svislando).
 Miĥalski, Eĝ., Poŝtkesto 720, Esperanto-Komitato, Stalino-Donbas (Ukraino).
 Minor, Karl, 62 Cranwich Road, Stamford Hill, London, N.16.
 Muĉnik, I., Kfar Jehošuo, apud Haifa (Palestino).
 Neergaard, Paul, Kastelvej 21, København (Danlando).
 Nekrasov, N., ul. Gorjkogo 113, kv. 1, Moskva 47 (U.S.S.R.).
 Nišimura, K., Oomoto, Kameoka, Kioto-hu (Japanlando).
 Nylén, P., Gröna Villan, Huddinge, Stockholm.
 Okamoto, 29 Yushima, 6, chome Hongooku, Tokio (Japan.).
 Orego, R., D-ro (pseud. "Mevo") Esperanto-Centro Itala, Galleria Vittorio-Emanuele, 92 Milano (Italujo).
 Pitlik, Augustin, D-ro, Kremencova 17, Praha II (Ĉeĥoslovakujo).
 Porto Carreiro Neto, D-ro L. da Costa, Rua 24-de-Maio, 424, Rio de Janeiro.

Privat, D-ro Edmond, Villa Bellavista, Locarno (Svislando).
 Rakuša, Prof. R., Ciril-Methodova 18, Maribor (Jugoslavujo).
 Reed, S-ino Ivy Kellerman, 1707 Surrey Lane, Washington (Usono).
 Rollet de l'Isle, M., 35 Rue du Sommerard, Paris V.
 Rotkviĉ, Ivo, Basariĉka st. 12, Zagreb (Jugoslavujo).
 Rousseau, C., 2 Rue A. de Vigny, Bécon-les-Bruyères (Seine).
 Rublev, S., Kazarmenny per. 7, Odessa.
 Saldanha Carreira, J. A. de, Av. Duque de Loulé 50, III, Lisboa.
 Scherer, Joseph R., 4474 West Adams Blvd., Los Angeles, Calif. (Usono).
 Schmid, Jakob, Müslinweg 2, Elfenu, Bern (Svislando).
 Schoor, Jan van, Julius de Geyterstraat, 131-1, Antwerpen.
 Schoor, Oscar van, Vondelstraat, 20, Antwerpen.
 Setälä, Vilho, Muscokatu 40 A, Helsinki (Finlando).
 Sevak, G., poŝtkesto, 78, Erivan (Armenujo).
 Shafer, Ad., 45 Courthorpe Rd., Hampstead, London, N.W.3.
 Sola, M., San Francisco 12, Terrassa (Barcelona).
 Spiridoviĉ, E., ul. Libkneĥta 45-12, Ĥarkov (Ukraino).
 Stamatiadis, D-ro Anakréon, Rue Rodou 21, Athenai.
 Stojan, Petro, Blausasc-Escarène (Alpes-Maritimes, Francujo).
 Stroele, Georges, Maujobia 7, Neuchâtel (Svislando).
 Szilagy, D-ro F., Csalogany-u., 33, Budapest II.
 Šupichova, F-ino J., Mala Štěpanska 6, Praha II.
 Tellini, D-ro Achile, Piazza Vittorio Emanuele 9a, Udine.
 Tschernochvostoff, G., Idrottsgatan 22, A. 10, Helsinki (Finlando).
 Uitterdijck, D., "Domo Zamenhoff," Hyacintenlaan 1, Hilversum (Nederlando).
 Wadham, F. E., "Holmbury," Woodcote Hurst, Epsom (Surrey, Anglujo).
 Waringhien, Prof. G., 47 Rue de Douai, Lille (Francujo).
 Wenger, J., Crêt Tacconnet 28, Neuchâtel (Svislando).
 Wiesenfeld, E., Śniadeckich 13, Warszawa.
 Zamenhoff, F-ino Lidja, Krolewska 41, Warszawa.
 Zon, Frato Wigbertus van, "Huize Steenwijk," Vught, N. Br. (Nederlando).

Raporto de la Prezidanto de la Lingva Komitato

I.—ADMINISTRA FUNKCIADO

A.—Personaro.

Kun grandaj bedaŭro kaj malĝojo mi sciigas ke, de mia Raporto al la Kongreso de 1935, mortis ok membroj de la Lingva Komitato, samideanoj konataj kaj altŝatataj de la esperantistaro pro iliaj servoj al nia afero: *S-ino M. Blaise* (Anglino), *S-roj D-ro H. Arnhold* (Germano), *Bonnevie* (Norvego), *Rob. Kreuz* (Germano), *J. Merchant* (Anglo), *M. Mojado* (Hispano), *L. Sepulveda Cuadra* (Ĉilano), *A. L. Villanueva* (Hispano).

Eksigis tri membroj: *S-roj M. Butin* (Germano), *Meŝtan* (Aŭstro). *Simon* (Aŭstro).

Nun la nombro de la L.K.-anoj estas 116.

Pro kaŭzoj, kiujn mi klarigos ĉi sube, la ĉiujaraj elektoj en la L.K.-on ne okazis komence de la nuna jaro.

B.—Statutoj.

La statutaro kaj la regularo aranĝitaj laŭ la proponoj montritaj en mia Raporto de 1934 estas publikigitaj en la jarlibro de 1935, kaj la L.K.-anoj estas petitaj sciigi la Prezidanton pri siaj kritikoj antaŭ la 1-a de januaro 1936.

Krom kelkaj rimarkoj pri la formo, kiuj estos atente ekzamenitaj kaj eventuale kontentigitaj, nur estas ricevitaj la deziroj esprimitaj de la dek membroj kunsidintaj dum la Kongreso de Roma, sub la prezidanteco de Prof. Migliorini, vicprezidanto de L.K.

Ili estas: 1-e, ke la nombro de la membroj ne superu 100; 2-e, ke tiu nombro estu realigita en Decembro 1940 per limigado de la plenigado de la vakantaj postenoj (laŭ propono de Prof. Migliorini estos neplenigitaj nur la postenoj vakantaj pro morto, eksigo aŭ eksigo); 3-e, ke inter la propono de novaj kandidatoj kaj ilia baloto estu almenaŭ duonjara intertempo.

Tiuj deziroj estas prezentitaj por aprobo al la L.K.-anoj en Januaro 1936. Pro graveco de tiuj deziroj, la limdato por respondi estas fiksita je la 15-a de Junio, 1936. Kompreneble baloto ne povas okazi antaŭ tiu dato.

Kune kun tiuj deziroj estas prezentitaj al la L.K.-anoj tiuj rilataj al la forstreko de la parto de la regularo rilata al la lingva konsisto de la lingvaj institucioj.

Akademio

(Vidu la adresojn en la laŭ-alfabeta listo de la L.K.-anoj)

Prezidanto:

M. Rollet de l'Isle, Paris.

Vic-Prezidantoj:

Prof. D-ro B. Migliorini, Roma; P. Nylén, Stockholm.

Direktoroj:

Sekcio: Komuna Vortaro: W. Bailey, Penrhyn Bay (Brit.).

Gramatiko: D-ro W. Lippmann, Leipzig.

Kontrolo: M. Rollet de l'Isle, Paris.

Tekn. Vortaroj: Prof. D-ro Ing. R. Orenge, Milano.

Sekretario-Kasisto:

R. de Lajarte, Fontenay-sous-Bois (Seine, Franc.).

Membroj:

C. Aymonier, J. Baghy, Intend.-Generalo L. Bastien, L. Belmont, P. Bennemann, D-ro P. Corret, Pastro A. Cseh, Prof. V. Inglada, Prof. Ing. I.R.G. Isbrücker, V. Setälä, D-ro A. Stamatiadis.

Korespondantoj:

F-ino L. Zamenhof (pola lingvo), E. Drezen (rusa lingvo), M. Sola (kataluna lingvo), A. Tellini (ladina lingvo), D-ro E. Backheuser (portugala lingvo).

C.—Publikigaĵoj.

Oficialaj sciigoj de la Akademio.—Estas publikigitaj ok numeroj. Bedaŭrinde ni devas denove atentigi la gazetistojn al tiuj dokumentoj, *kiujn ili preskaŭ neniam represas.* Oni riproĉas la Akademion kiam ĝi ne laboras (kaj ankaŭ kiam ĝi laboras !); sed neniu de ĝi petitan helpon oni konsentas.

Jarlibro.—La jarlibro de 1935 estas publikigita; ĝi entenas la statutaron kaj la regularon aranĝitajn laŭ la decidoj de la L.K. Aldona noto sciigas, ke la reguloj montritaj en la jarlibro de 1934 estos obeataj ĝis kiam la novaj tekstoj estos aprobitaj de la L.K. Tiu jarlibro ankaŭ entenas *mallongan historion de la Lingvaj Institucioj, liston de la naciaj diplomoj* (vidu raporton 1935), kaj de la *oficialigitaj vortoj.*

D.—**Financoj.**—Vidu la ĉi postan Raporton.

II.—PRILINGVA FUNKCIADO

A.—Estas prezentita por oficialigo la sufikso **end** kun la difino=*kiu devas esti—ata.* Tiu sufikso **ne** estas oficialigita.

B.—La respondoj al la cirkulero per kiu la L.K.-anoj estas petitaj sciigi sian opinion pri la metodoj, kiujn ili opinias la plej taŭgaj por **oficialigo de vortoj**, estas publikigitaj en la *oficialaj sciigoj* (n° 11—*Januaro*, 1936).

El ili rezultas: 1-e ke neniu kriterio estas ĝenerale aprobita por anstataŭi la nunan (maturecon), kaj ke, sekve, tiu ĉi estas konservata; 2-e ke estas dezirinda intertempo de almenaŭ kvin jaroj inter du sinsekvaj aldonoj, kaj ke, sekve, la venonta estos prezentata en 1940; 3-e ke la prezentitaj vortoj estos aranĝitaj laŭ unu nura listo; 4-e ke la oficialigitaj vortoj estos publikigitaj en la jarlibro.

C.—La L.K.-anoj Kalocsay kaj Waringhien petis la Akademianojn ekzameni la **Plenan Gramatikon**, kiun ili verkis kaj publikigis. Ĉiuj Akademianoj konsentis pri tio kaj ankaŭ pri publikigado kaj diskutado de siaj opinioj en *Lingvo-Libro*; sed ne pri aldonado al la dua eldono, de oficiala opinio de la Akademio, kiun deziris la aŭtoroj.

D.—La 23-a japana Kongreso (1935) esprimis la deziron, ke estu publikigitaj **Plena Vortaro, Gramatiko kaj Stilistiko** kun helpo de la oficialaj esperantaj institucioj kaj de bonvolaj ĉiunaciaj fakuloj. En la n° 11 de la oficialaj sciigoj estis publikigata tiu deziro.

E.—La Prezidanto verkis kaj publikigis raporton pri la **Skribado kaj Prononcado de la personaj kaj lokaj nomoj**, por plifaciligi al la Akademio la studadon de tiu demando. Konklude li proponis, ke estu uzata por la naciaj nomoj, la metodo kiun uzas la naciaj lingvoj por la fremdaj nomoj, t.e. ili estos skribataj kiel eble plej ĝuste laŭ la originala ortografio, kaj prononcataj laŭ la originala prononcado, se ĝi estas konata per aŭdado de naciuloj, kaj, se ne, kiel esperantaj vortoj. Tiu raporto estas sendita al la L.K.-anoj, kaj la Akademianoj estas petitaj decidi ĉu ili konsentas proponi al la esperantistoj provan uzadon de tiu metodo.

ROLLET DE L'ISLE.

RAPORTO DE LA DIREKTORO DE LA SEKCIO KOMUNA VORTARO

La ĉefa laboro de tiu sekcio en la jaro 1935 koncernis la *Sesan Aldonon al la Universala Vortaro*. Por eviti polemikon pri la enkonduko de senbezona neologismoj, mi elektis nur vortojn jam uzitajn de Zamenhof ne sole en vortaroj, sed ankaŭ en la praktiko. El la 25 vortoj prezentitaj al la Lingva Komitato por voĉdonado, la sekvantaj 21 estas aprobitaj: angoro, aperturo, aplombo, arbusto, aŭguri, aŭreolo, baletto, bankiero, gramofono, grego, honorario, ingredienco, koncesio, konduktoro, monotona, strebi, susuri, ŝrumpi, vinkto, vivisekcio, vizio.

WILLIAM BAILEY.

RAPORTO DE LA DIREKTORO DE LA SEKCIO DE KONTROLO

La Sekcio funkciis laŭ la metodoj montritaj en la antaŭaj raportoj kaj en la regularo de la jarlibro 1935.

Ĝi ricevas preskaŭ ĉiujn gazetojn kaj librojn. De la fondo de la sekcio estis ekzamenitaj ĉirkaŭ 65 libroj; bedaŭrinde, pro manko de kompetentaj bonvolaj kontrolantoj, nur la libroj estas ekzamenitaj; la eblaj kontrolantoj de la vortaroj, t.e. la L.K.-anoj reprezentantoj de la nacia lingvo, estus ĝenerale la aŭtoroj mem!

La rimarkoj rilataj al ĉiu libro estis senditaj al la eldonoj, por ili mem kaj la aŭtoroj.

Al la landaj Asocioj, kies *diplomoj* estas normigitaj kaj pri kiuj sciigoj estas publikigitaj en la jarlibro, estas aldonendaj Katalunujo kaj Nederlando.

Kelkaj samideanoj sendis siajn verkojn por ekzameno antaŭ la publikigado. Por eviti tiun eraron, ni devas denove atentigi la aŭtorojn pri la rolo de la Sekcio, kiu konsistas ekzameni *nur la publikigitajn verkojn, ne la publikigitajn*.

Pri la evoluo de la lingvo, Prof. Boucon, kontrolisto, skribis :

“ . . . Kun plezuro mi konstatis, ke nia lingvo pli kaj pli fortikiĝas kaj belikiĝas, kaj ke la eraroj, en la nun aperantaj libroj fariĝas laŭgrade malpli nombraj. Ĉi tio venas de la fakto, ke Esperanto nombras nun multe da kleraj, talent-havaj adeptoj, kaj ankaŭ de tio, ke ni posedas bonegajn eldonistojn en la tuta mondo, eĉ en Japanujo.

Koncerne la gramatikan korektecon, mi rimarkis, ke la bonaj aŭtoroj pli kaj pli evitas la prepozicion *je*, kaj ke ili ĝin konservas plej ofte nur por precize indiki la lokon kaj la tempon ; por ekzemploj : *li staris antaŭ mi je tri metroj ; ni forveturos morgaŭ je la deka horo*.

La difina artikolo kaj la determinaj vortoj *tiu, ia, iu, unu* uziĝas pli ofte ol iam, kio utilas al la klareco ; oni same uzas nun pli volonte la kompleksajn verbajn tempojn ol la simplajn formojn ; ekzemple, anstataŭ : *se oni tiam lin ne helpus, li mortus*, oni prefere diras hodiaŭ : *Se oni ne estus lin helpinta, li nun estus mortinta*.

Ĉiam vigle mi kontraŭbatalas iajn herezojn, nome la ekskluzivan uzadon de *io* ĉe la landnomoj, kaj precipe tiun de la formoj, *aliu, aliel, aliam, ilies, onies*, k.s. Tiajn monstraĵojn ni devas nepre ekstermi ; ili estas pli danĝeraj ol multaj neologismoj. Aliparte mi atentigas pri la vera senco de kelkaj vortoj perfide dusencaj, nome : *domaĝi, sekreti, fremda, prudenta* ; mi rekomendas ke oni forigu iajn sufiksojn, kiam ili estas evidente senutilaj. Multaj verkistoj, ekzemple, diras : *diligentema, hontemo, fanfarenemo, vantemo*, kiam *diligenta, honto, fanfarono*, kaj *vanto* sufiĉus. Antaŭ ĉio nia lingvo estu harmonia kaj klara.

De tempo al tempo mi ricevas aprobojn de la recenzitaj aŭtoroj mem, kaj tiel mi ekvidas kun kontento, ke nia laboro ne estas vana, kaj ke, danke al nia Sekcio de Kontrolo, nia kara Esperanto evoluas kaj progresas irante sur bona vojo”

ROLLET DE L'ISLE.

RAPORTO DE LA SEKCIO TEKNIKAJ VORTAROJ

Pro troa okupiteco pri la Kongreso de Roma, Inĝeniero Orengo, Direktoro, ne povis okupiĝi pri la Sekcio.

En la *Bulteno de la Internacia Scienca Asocio* estas menciitaj kelkaj provoj pri starigo de diversaj teknikaj vortaroj, sed ĝis nun ili ne sukcesis atingi finan rezulton. Necesus, ke tiuj provoj estu kuraĝigitaj kaj sisteme ordigitaj. Ni deziras ke nia agema samideano Orengo povu baldaŭ antaŭenpuŝi tiun gravegan organizon.

Nur estas menciinda tre granda sukceso, kiu, se ni scias ekspluati ĝin, alportos al ni baldaŭan venkon en la sciencaj kaj teknikaj rondoj : ĝi estas la decido de la *Internacia Elektroteknika Komisiono* aldoni la esperantajn terminojn en la elektroteknikan terminaron, apud la anglaj, francaj, germanaj, italaj kaj hispanaj terminoj. Tiu sukceso estas atingita dank' al plurjara klopodo de kelkaj samideanoj, kaj ĉefe de D-ro Inĝ-o Wüster, kiu verkis la terminojn.

ROLLET DE L'ISLE.

provizora direktoro.

KALKULOJ DE LA ESPERANTISTA AKADEMIO

(1a de Julio, 1935—31a de Marto, 1936)

Enspezoj				Elspezoj			
				<i>sv. fr.</i>			
En kaso (30 de Junio, 1935)	41.05	Poŝtelspezoj	45.90
Donaco	100.50	Presajoj	34.50
Subvencio de U.E.A.	400.00	Maŝinskribaĵoj (Cirkuleroj, kopioj, k.a.)			56.50
Vendo de diversaj publikigaĵoj de la Akademio (Ĉeko el "Esperantista Centra Librejo")	167.25				
				Sekretariejo			
				Kovertoj	1.40
				Laboraj horoj kaj	60.10
				Repago de transportaj elspezoj	..	9.40	
							69.50
				Sume	207.80
				Restas en kaso	501.00
			708.80				708.80

La Sekretario-Kasisto,

R. DE LAJARTE.

LA ROLO DE LA DELEGITOJ POR LA PRAKTIKAJ SERVOJ

La delegitoj plenumas en U.E.A. plej gravan rolon. Dank'al ili kaj al la maniero, laŭ kiu ili konsentas plenumi sian rolon, la organizo de la praktikaj servoj povos, aŭ ne, fariĝi realaĵo.

Instrukcioj jam precizigis ilian rolon dum la pasintaj jaroj. Sed fakte ili sin okupis ĝenerale nur pri turismaj aferoj. Hodiaŭ la publiko en ĉiuj lokoj konatiĝis kun nia universala asocio kaj deziras provi ĝiajn praktikajn servojn. La momento venis por peti la delegitojn en la grandaj centroj, ke ili bonvolu pligrandigi sian rolon laŭ la komuna deziro.

Ni tuj diras, ke ni ne intencas trudi novan ŝarĝon al la delegitoj, kiuj ĝis nun deĵoris por ni tiel sindoneme dum multaj jaroj. Ni nur volas proponi al tiuj, kiuj havas eblecon helpi al ni iom pli multe ol antaŭe, kelkajn taskojn, kiuj eble instigos ilin al novaj iniciatoj.

En la malgrandaj urboj oni kredeble nenion devos ŝanĝi. En la grandaj male, la lokaj organizaĵoj povos, se la nuna delegito ne deziras plimultigi sian esperantistan laboron, meti apude la vicdelegiton aŭ komercan delegiton, kiu havos specialan taskon.

La rolo de la delegito iom aliformiĝis de l'momento, kiam U.E.A. fariĝis la sola esperantista centro, funkcia samtempe por la propagando kaj por la praktikaj servoj. La delegito ĉesas esti komisiita nur por la praktikaj servoj; li devas zorgi ankaŭ por la ĝenerala propagando. En la urboj, kie ne ekzistas propaganda grupo, li reprezentas ĉiurilate la asocion, kaj lia unua devo estas tie varbi novajn membrojn por U.E.A.

Pri liaj funkcioj, ŝajnas utile ilin precizigi. Estas dezirinde, ke la agado de la delegitoj celu ĉefe tri laborkampojn. Ĝi samtempe utilu al la komerco, al la turismo, kaj al la kultura interrilato.

I. *Komerco*.—(a) La delegito donu informojn pri komercaj aferoj. Se ekzistas en lia komunumo komerca ĉambro aŭ informasocio, li turnu sin al ili; kaj tiel li eventuale povos limigi sian laboron al traduko de la demanda letero.

(b) La delegito akceptu kaj konservu komercajn cirkulerojn, prospektojn, k.t.p. Unufoje ĉiujare, prefere en la aŭtuno, li aranĝu en montrejo de iu komerca firmo ekspozicion per helpo de la ricevitaj dokumentoj. La delegito devas pri ĉiu dokumento doni malgrandan resumon en sia gepatra lingvo. La loka Esperanto-grupo devas helpi por la organizo de tiu ekspozicio.

(c) La delegito vizitu la lokajn komercajn firmojn kaj asociojn, kiuj vendas varojn eksterlanden, kaj instigu ilin pretigi en Esperanto cirkulerojn, prospektojn, gvidfoliojn, k.t.p. La loka esperantista grupo helpu la delegiton prepari la dokumentojn. Se temas pri longaj tradukoj, la koncerna firmo devas pagi la faritan laboron. La pres- kaj sendkostojn pagu kompreneble la firmo.

Kiam la delegito vizitas la firmojn por fari siajn proponojn pri reklamo per Esperanto, li havu en manoj statistikajn dokumentojn pri la disvastiĝo de esperanto en la diversaj medioj. Tiajn dokumentojn la delegito ricevos parte el la centro de U.E.A. kaj parte el la esperantistaj gazetoj.

II.—*Turismo*.—(a) La delegito informu la esperantistajn turistojn, parole aŭ letere, pri vidindaĵoj, vojaĝeblecoj, hoteloj, prezoj, k.t.p.

(b) Li akceptu kaj konservu turismajn broŝurojn, cirkulerojn kaj gvidfoliojn. Unufoje ĉiujare, prefere en la printempo, li aranĝu ekspozicion en montra fenestro de iu vendejo. Se la loka esperantista grupo posedas propran afiŝtabulon aŭ keston, la turismaj broŝuroj povos esti montrataj pli ofte. Cetero la turisma ekspozicio estu aranĝata proksimume kiel la komerca.

(c) La delegito instigu laŭpove la lokajn turismajn asociojn eldoni siajn gvidfoliojn kaj broŝurojn en Esperanto. Pri la agmaniero, li sekvu la konsilojn sub Ic.

III.—*Kultura interrilato*.—La delegito laŭpove respondu al demandoj pri kulturaj, juraj, literaturaj kaj sciencaj aferoj. Lia rolo estu precipe: serĉi en la hejmlandaj statistikajn informojn, kopii en bibliotekoj kaj muzeoj maloftajn dokumentojn, k.t.p.

IV.—*Konigo de la delegito*.—(a) La ĝenerala publiko estu informata pri la nomo kaj adreso de la delegito. Prefere sur la muro de la domo, en kiu loĝas la delegito, estu tre videbla U.E.A.-ŝildo kun la nomo de la delegito. Tia ŝildo

kun adresinformo estu ankaŭ metata laŭeble en la fervoja stacio, poŝta domo, komerca ĉambro, urbdomo kaj ĉe la enirejo de la urbo.

(b) La delegito informu la redakcion de la loka komerca gvidlibro pri siaj nomo kaj adreso, por enpreso.

(c) Tuj kiam li estas elektita, kaj poste, ĉiujare, en la mezo de januaro, la delegito sendu al la lokaj gazetoj, en sia gepatra lingvo, informon kun la peto, ke oni aperigu artikoleon pri liaj funkcioj.

V.—*Honorofico*.—Senpage donu la delegito mallongajn informojn pri petitaj demandoj. La demandinto nur kunsendu internacian respondkuponon por kovri la poŝtelspezojn. Se tamen farita demando postulos oferon de konsiderinda tempo, la delegito, post tuja enketo, respondu al la petinto, ke informo estos sendata kontraŭ monsumo kompensanta la tempo-perdon. Ĉiu oferita horo estu kompensata per 1 ĝis 1,50 svisa franko. Krom tio, transportaj kaj aliaj elspezoj de la delegito estu kompensataj.

La delegito ĉiam akurate plenumu sian funkcion kaj tuj respondu al faritaj demandoj.

La agadkampo de la delegito ne estu limigata, kaj laŭbezono li ĝin pli grandigu.

La iom vasta laborprogramo, kiun ni proponas hodiaŭ al la iniciatemo de la delegitoj, celas kelkajn novajn punktojn, kiuj montriĝis gravaj. Estas klare, ke la plej multaj delegitoj kun plezuro sekvas la ĉi-suprajn konsilojn, por tiel grandigi la efikecon kaj praktikan valoron de U.E.A.

SE NE ESTAS DELEGITO

en via urbo, kaj vi estas preta kaj kapabla tiel agi, bonvole sciigu al la Ĉef-Delegito por via lando, aŭ, se tiu ne ekzistas, al la Centra Oficejo de U.E.A.

RAPORTO de la INTERNACIA RADIO-KOMISIONO KOMISIITA de U.E.A.

Por la unua fojo, mi, kiel Prezidanto de la Internacia Radio-Komisiono, havas la honoron, prezenti al la Esperantistaro la ĉiujaran raporton.

Nova Prezidanto.—De post 1928 la gvidado de la Komisiono estis konfidita al sinjoro Johannes Jungfer en Lübben, —Germanujo—. Li organizis ĉion en modela maniero. Kreante la “Internacian Radio-Servon” li certigis al ni la kunlaboron de multaj esperantistoj speciale aktivaj en radio, same tiun de samcelaj organizaĵoj esperantistaj en diversaj landoj. S-ro Jungfer pro specialaj kaŭzoj estis devigita demeti sian oficon en novembro 1935. Pro tio ni hodiaŭ deziras esprimi al li, publike, sinceran dankon pro la valorega servado, kiun li faris al nia komuna celo dum 7 jaroj.

La Estraro de U.E.A. elektis kiel novan Prezidanton de la komisiono s-ron Gustav Henriksson en Helsingborg, Svedujo.

La verda radio-stacio—Brno.—La ĉiumonataj Esperanto-horetoj de tiu stacio varbas per si mem. Ke la dissendoj trovis subtenon inter la esperantistaro montras la jenan statistikon,—statistikon kiu samtempe pruvas la disvastigitecon de Esperanto tra la mondo. Radiojournal Brno ricevis en la jaro 1935 el 31 landoj entute 4125 skribaĵojn, kiuj montris al la sendo-stacio, kiun intereson la Esperanto-horetoj ĉiam trovas inter la esperantistoj.

Esperanto-Radio-Programo.—La E.R.P., en kiu estas publikigita ĉiuj Esperanto-dissendoj en Eŭropo aperis ĝis fino de la jaro 1935 po du foje monate. De post komenco de la jaro 1936 ĝi aperis monate kaj, laŭbezone, korektigoj. Celo de tiu prova aranĝo estas ŝpari laboron kaj sendkostojn.

Radio-Statistiko 1936.—Detalan informon pri la radio-statistiko donas la aldonita listo pri la Stato de la Radio-Statistiko en la jaro 1935.

Aliaj Radio-organizaĵoj en Esperantujo.—La Internacia Radio-Komisiono ankaŭ en la pasinta jaro laboris en bona interkonsento kun la Radio-Klubo-Esperantista de Francujo, kiu prizorgas la radio-aferojn en Francujo. Ĉi tiu klubo aperigas nun specialan S.O.S.-bultenon, kies celo estas

subteni la Esperanto-radio-parolantojn kaj publikigi la Esperanto-dissendojn. Mi aparte dankas s-ron M. Alglave, —Blanc-Misseron— kaj s-ron M. Nogé, —Dunkerque— pro ilia senlaca kunlaborado.

En Britujo nia radio-penado inter la esperantistaro ne gajnis terenon. Tamen la plej granda brita radiogazeto *World-Radio*, dank’ al la penadoj de s-roj Oliver kaj Durrant —London— ankoraŭ ĉiam havas Esperanto-angulojn.

Ankaŭ en la aliaj landoj ni sukcesis pli-malpli. Ne estas eble menciĝi ĉiujn detalaĵojn en mallonga raporto. Al ĉiuj kiuj helpis al ni ankaŭ en la lasta jaro, mi volas speciale danki pro la ĝisnuna kunlaborado. Apartan dankon mi volas diri al U.E.A., kiu ebligis nian laboron ĝis hodiaŭ per regula financa subteno kaj kies antaŭa direktoro, s-ro Kreuz, ĉiam kaj ĉie helpis al ni por sukcesi.

GUSTAV HENRIKSSON,

Prezidanto.

Helsingborg-Svedujo, en majo, 1936.

STATO DE LA RADIO-STATISTIKO EN LA JARO 1935

LANDO Sendstacio	Paroladoj		Esp. kur- soj	Dissendoj	
	pri Esp.	en Esp.		ĝis 1934	fino 1935
Aŭstrujo					
Graz	—	46	—	283	329
Innsbrück ..	—	46	—	243	289
Klagenfurt ..	—	46	—	243	289
Linz	—	46	—	196	242
Salzburg ..	—	46	—	158	204
Vorarlberg ..	—	46	—	50	96
Wien	—	46	—	284	330
Ĉeĥoslovakujo					
Brno	—	13	—	160	173
Bratislava ..	—	13	—	74	87
Košice	—	13	—	8	21
Moravska					
Ostrava ..	—	19	—	15	34
Praha	—	13	—	47	60
Estonujo					
Tallinn	—	57	—	333	390
Tartu	—	57	—	212	269
Francujo					
Alpes-Grenoble	—	6	6	182	194
Cannes	—	42	10	155	207
Juan-les-Pins ..	—	42	10	155	207
Lille P.T.T.					
Nord	—	25	25	322	372
Limoges P.T.T.	—	6	6	123	135
Lyon-la-Doua ..	—	36	9	476	521
Radio-Lyon ..	—	—	23	117	140
Marseille-					
Provence	—	34	3	176	213
Nice	—	42	10	155	207
Paris P.T.T. ..	—	24	24	368	416
Tour Eiffel ..	—	34	—	82	116
Italujo					
Milano	—	60	—	—	60
Roma	—	60	—	22	82

LANDO Sendstacio	Paroladoj		Esp. kur- soj	Dissendoj	
	pri Esp.	en Esp.		ĝis 1934	fino 1935
Jugoslavujo					
Ljubljana ..	—	15	—	221	236
Nederlando					
Hilversum ..	—	21	—	98	119
Huizen	—	43	23	320	386
Norvegujo					
Bergen	—	1	—	3	4
Fredrikstad ..	—	1	—	3	4
Oslo	—	1	—	76	77
Notodden	—	1	—	33	34
Porsgrund ..	—	1	—	33	34
Rjukan	—	1	—	33	34
Polujo					
Krakow	—	14	—	73	87
Warszawa ..	—	14	—	58	72
Portugalujo					
Lisboa	—	—	16	35	51
Lisboa CT1A	—	8	—	48	56
Sovet-Unio					
Leningrad ..	—	157	—	378	535
Minsk	—	158	—	779	937
Svedujo					
Helsingborg ..	—	4	—	60	64
Karlskrona ..	—	3	—	60	63
Stockholm ..	—	6	—	40	46
29 relajsoj ..	—	144	—	783	927
Svislando					
Genève	—	—	9	617	626
Sottens	—	—	9	108	117

LAULANDA RADIO-STATISTIKO, 1935.

LANDO	Paroladoj		Esp. kursoj	Dissendoj	
	pri Esp.	en Esp.		ĝis 1934	fino 1935
Alĝerio ..	—	—	—	32	32
Aŭstralio ..	—	—	—	115	115
Aŭstrujo ..	—	322	—	1457	1779
Belgujo ..	—	—	—	286	286
Brazilio ..	—	—	—	80	80
Britujo ..	—	—	—	64	64
Ĉeĥoslovakujo	—	71	—	304	375
Danujo ..	—	—	—	361	361
Dancigo ..	—	—	—	308	308
Egiptujo ..	—	—	—	2	2
Estonujo ..	—	114	—	583	697
Finlando ..	—	—	—	20	20
Francujo ..	—	291	126	2645	3062
Germanujo ..	—	—	—	5850	5850
Hispanujo ..	—	—	—	616	616
Hungarujo ..	—	—	—	30	30
Ĥinujo ..	—	—	—	36	36
Irlando ..	—	—	—	3	3
Islando ..	—	—	—	24	24
Italujo ..	—	120	—	66	186
Japanujo ..	—	—	—	394	394
Javo ..	—	—	—	6	6
Jugoslavujo ..	—	15	—	421	436
Kanado ..	Informoj mankas	—	—	—	—
Koreo ..	—	—	—	15	15
Latvujo ..	—	—	—	7	7
Litovujo ..	—	—	—	393	393
Meksiko ..	—	—	—	61	61
Nederlando ..	—	64	23	419	506
Norvegujo ..	—	6	—	243	249
Novzelando ..	—	—	—	104	104
Polujo ..	—	28	—	173	201
Portugalujo ..	—	8	16	83	107
Sovet-Unio ..	—	315	—	2328	2643
Svedujo ..	—	157	—	1487	1644
Suez ..	—	—	—	1	1
Svislando ..	—	18	—	1005	1023
Turkujo ..	—	—	—	1	1
Urugvajo ..	—	—	—	83	83
Usono ..	—	—	—	415	415
Sumo ..	—	1529	183	20521	22233

EKONOMIA RAPORTO DE I.R.S.

Novembro, 1935—Aprilo, 1936.

Enspezoj :

Subvencio de U.E.A. .. Sveda kr. 70.00

Elspezoj :

Nov., 1935	Necesaj presajoj okaze de la translokiĝo : poŝtkartoj kaj kovriloj ..	18.00
	Multobligo de la E.R.P.	2.50
	Afrankoj	6.00
Dec., 1935	Multobligo de la E.R.P.	2.50
	Afranko	5.50
Jan., 1936	Multobligo de la E.R.P.	2.50
	1 Broŝurilo	6.10
	1 Leterujo	3.00
	Afrankoj	7.00
Febr., 1936	Multobligo de la E.R.P.	2.50
	Presajoj : kovertoj kaj leterpaperoj	21.00
	Afrankoj	6.25
Marto, 1936	Multobligo de la E.R.P.	2.50
	Afrankoj	6.50
Aprilo, 1936	Multobligo de la E.R.P.—3-folia ..	3.75
	Afrankoj	7.15

Sv. kr. 102.75

	Enspezoj	Elspezoj
Subvencio de U.E.A.	70.00	—
Necesaj elspezoj	—	102.75
Deficito	32.75	—
Sv. kr.	102.75	102.75

Helsingborg, 17 majo, 1936.


GUSTAV HENRIKSSON.

Internacia Esperanto-Muzeo

WIEN, I. NEUE BURG, HELDENPLATZ

Protektoro: Federacia Prezidanto de Aŭstrujo, S-ro Wilhelm Miklas.

Fondinto kaj prezidanto: Kortega Konsilisto Hugo Steiner.
Malfermata labortage 9-12, 15-18 h., sabate 9-12 h.
Inaŭgurita 1an de Aŭgusto 1929.



Internacia Esperanto-Muzeo en Wien (I.E.M.W.) estas fako de fama Nacia Biblioteko en Wien, do ne nur sub ŝtata protekto, sed la Ministerio por Instruado nepre estas devigata per kontrakto konservi por eternaj tempoj ĉi tiun kolekton kiel apartan fakon.

I.E.M.W., kiu nun ampleksas proksimume 7,000 volumojn, kolektas la tutan materialon pri la problemoj de la internacia lingvo kaj speciale pri Esperanto. Ĝi akceptas donacojn de libroj, dokumentoj pri ĉio, kio koncernas tiun ĉi movadon.

Kiu deziras helpi kaj subteni I.E.M.W. fariĝu dumviva membro por unufoja pago de sv. fr. 12.50. Grupoj, korporacioj pagas la samon por 10 jaroj. Vi per tio subtenos la laboron kaj helpos al la Esperanta movado, kiu nepre bezonas fontojn, statistikojn, k.t.p. el la Muzeo.

Kuratora Komitato de I.E.M.W., Wien, I. Neue Burg.

LA ESPERANTA GAZETARO

Amerika Esperantisto (*Esperanto Association of North America*).—1617 H. St., N.W., Washington, D.C., Usono. Unu dolaro.

Amikoj de Esperanto (*Por la japana lernanto*).—Japana Esperanto-Asocio, Kudan 3-ĉome, Kojimaĉi, Tokio. Prezo ne montrita.

Argentina Esperantisto (*Argentina Esperanto-Asocio*).—Misiones 369, Buenos Aires, Arg. Du dolaroj.

Aŭstria Esperantisto (*Aŭstria Esperanto-Asocio*).—Neue Burg, Wien I. 3.75 sv. fr.

Belga Esperantisto (*Reĝa Belga Ligo Esperantista*).—44 Avenuo De Bruyn, Wilrijck, Antverpeno, Belgujo. 30 fr.

Brazila Esperantisto (*Brazila Ligo Esperantista*).—Rua Marechal Floriano 212, Rio de Janeiro. 4 sv. fr.

Brita Katoliko (*British League of Catholic Esperantists. Multobligita*).—7 Markville Gdns., Caterham, Surrey.

British Esperantist, The (*Brita Esperantista Asocio*).—142 High Holborn, London, W.C. 1. 2ŝ. 6p.

Budhismo, La (*Budhana Ligo Esperantista*).—8 Elmwood Drive, Heswall, Cheshire, Anglujo. Kvarmonata. 10 pecoj.

Bulgara Esperantisto (*Bulgara Esperantista Asocio*).—Poŝtkesto 233, Sofia (Sredec), Bulgarujo. 1 sv. fr.

Bulteno de Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista.—447 Uralské nám., Praha XIX, Ĉeĥoslovakujo.

Bulteno de Internacia Scienca Asocio Esperantista.—56 Rue de la Rochefoucauld, Paris 9, Francujo. 15 fr. fr.

Dansk Esperanto-Blad (*Centra Dana Esperantista Ligo*).—P. Frey, Clausensvej 26, Haderslev, Danujo. 2 kr.

Dia Regno (*Kristana Esperantista Ligo Internacia. Protestanta*).—94 Adolf-Hitlerwall, Quedlinburg, Germanujo. 2 gmk.

Esperanta Gazeto, La (*Ĉiusemajna gazeteto*).—17 Schipbeekstraat, Amsterdam-Zuid, Nederlando. 1.25 guld.

Esperanta Ligilo, La (*Blindula, Brajla*).—Prezo ne montrita.

Esperanta Literaturo (*Japana Esperantoliteratura Societo*).—Fronto-Sa, 1148 Macunoki, Suginamiku, Tokio, Japanujo. 6 numeroj: 10 respondkuponoj.

Esperanto (*Universala Esperanto-Asocio*).—1 Tour de l'Île, Genevo, Svislando.

L'Esperanto (*Italujo*).—Corso Palestro 6, Torino. 15 liroj.

Esperanto Bladet (*Norvega Esperantista Ligo*).—Boks 197, Bekkelaget, Norvegujo. 3 kr. n.

Esperanto-Lernanto (*Japana Esperanto-Instituto*).—Hongo-Motomači, Tokio, Japanujo. 7 sv. fr.

Fervojisto, La (*Japana Esperantista Ligo Fervojista*).—Ĉe Aoki-Tak, Koomu-kjoku, Hosen-ka, Fervoja Ministrejo, Tokio, Japanujo.

Flandra Esperantisto (*Flandra Ligo Esperantista*).—29 Magdalenastr., Kortrijk, Belgujo. 5 belgoj.

Fluganta Skribilo (*Esperanta Stenografio kun suplemento Duploja*).—P. Flageul, 9 Bd. Voltaire, Issy-les-Moulineaux, Seine, Francujo. 3 fr. fr.

Franca Esperantisto (*Societo Franca por la Propagando de Esperanto*).—59 Rue de Neuilly, Rosny-sous-Bois, Seine, Francujo. 25 fr. fr.

Herezulo (*Sendependa revuo por batalado kontraŭ ĉiuj dogmoj. Trimonata*).—14 Avenue de Corbéra, Parizo 12, Francujo. 6 fr. fr.

Heroldo de Esperanto (*Esperanta ĵurnalo. Semajna sendependa organo de la Esperanta movado*).—94 Brusseler Strasse, Köln, Germanujo. 10 gmk.

Hispana Esperanto-Gazeto (*Hispana Esperanto-Asocio*).—1089 Apartado de Correos, Madrid, Hispanujo. Prezo ne montrita.

Hungara Heroldo (*Mezeŭropa Revuo. Trimonata*).—Pongrac-ut, F. 6-3, Budapest X, Hungarujo. 4 sv. fr.

Informelo de Zamenhof-Instituto.—Sitjas, 3 pral., Barcelono, Hispanujo. 6 pesetoj.

Informoj (*Esperanto-Asocio de Estonio*).—Postkast 6, Tallinn, Estonujo. 2.5 sv. fr.

Interligilo de la P.T.T., La (*Poŝta, Telegrafa*).—324 Rue Lecourbe, Paris XV, Francujo. 5 sv. fr.

Internacia Medicina Revuo (*Tutmonda Esperantista Kuracista Asocio*).—19 Avenue Montjoie, Uccle 3, Belgujo. 7.20 belgoj.

Internacia Pedagogia Revuo (*Tutmonda Asocio de Geinstruistoj Esperantistaj*).—13 Schoolstraat, Veendam, Nederlando. 5.0 sv. fr.

Internacia Veterinara Revuo (*Int. Veterinara Asocio Esperantista*).—D-ro Bär, Altenstadt (Hessen), Germanujo. 3 gmk.

Juna Vivo, La (*Ĵurnuloj, Komencantoj*).—West-Graft-dijk, (N.H.), Nederlando. 2.10 sv. fr.

Kataluna Esperantisto (*Kataluna Esperantista Federacio*).—245 Valencia, Barcelona, Hispanujo. 4 pesetoj.

Komerco, La (*Komercista Esperanto-Unio. Aperas neregule*).—4 Friedrich-Auguststr., Dresden-Radebeul, Germanujo. Po 0.25 gmk.

Komuniko por la Gazetaro (*Internacia Transport-laborista Federacio*).—Voldelstraat 61, Amsterdam, Nederlando. 2.50 sv. fr.

Kosmo, La (*Politiko, sociologio, de Japana vidpunkto*).—Japana Esperanto-Asocio, 2 Kudan 3-ĉome, Kojimaĉi-ku, Tokio, Japanujo. 3 sv. fr.

Kristana Gazeto (*Nederlanda Kristana Esperanta Unio*).—J. C. v. Dillen, Uitgever, Wijhe, Nederlando. 2.50 fr.

Kritika Observanto, La (*Socialista: Revuo politika kaj kultura. Trimonata*).—2 Malden Crescent, Chalk Farm, London, N.W.1. 1\$. 6p.

Laborista Esperantisto (*Nederland-laborista*).—Postbus 0.50, Amsterdam-O, Nederlando. 0.75 f.

Laboristo (*S.A.T. en Britujo*).—71 Blandford Road, Salford 6. 2\$. 8p.

Ligilo (*Ĉeĥoslovaka*).—Vrchlickeho 18, Proslejev, Ĉeĥoslovakujo. 3.50 sv. fr.

Ligilo por Vidantoj (*Blindula Esperanta movado*).—P. Merrick, Penso, Shepperton, Anglujo. 1\$.

Lingvo Internacia (*Grekujo*).—D-ro A. Stamatiadis, 21 Str. Rodon, Athens, Grekujo. 1 dolaro.

Lingvo-Libro (*Suplemento al "Literatura Mondo."*—*Literatura, Lingva, Detalaj librorcenzoj*).—Po 0.20 sv. fr., 3 ekz. 0.30 sv. fr. Mester ucca 53 V 5, Budapest IX.

Literatura Mondo (*Altklasa gazeto Literatura kaj Arta, kun suplemento "Lingvo-Libro."*) Mester ucca, 53 V 5, Budapest IX. 9 sv. fr.

Litova Stelo (*Litova Esperanto-Asocio*).—B. Giedra, Marijampole, Litovujo. 3 lit.

Lumo Orienta (*Japana Budhana Ligo Esperantista*).—Takakura-kaikan, Rokujo-Takakura, Kioto, Japanujo. 2.5 sv. fr.

Militrezistanto, La (*Internaciano de Militrezistantoj. Trimonata*).—11 Abbey Road, Enfield, Middlesex, Anglujo. 1ŝ. 2p.

Nederlando Esperantisto (*Organo de la Societo "La Estonto estas Nia"*).—7 Gerard Schaeprastraat, Amsterdam W, Nederlando. Prezo ne montrita.

Nederlanda Katoliko.—134 Pahudstraat, Hago, Nederlando. 3 f.

Nia Gazeto (*Monata eldono de "L'Eclairer de Nice"*).—29 Avenue de la Victoire, Nice, Francujo. 12 fr. fr.

Nia Informilo (*"Isosek." Instrua, literatura*).—23 Schinkelstr, Heerlen, Nederlando. 1.20 guld.

Norda Gazeto (*Nordfranca Federacio*).—72 Avenue G. Malo, Malo-les-Bains, Francujo. 6 fr. fr.

Nova TAGO, La (*Bahaa Movado*).—Bahaa Esperanto-Eldonejo, Neckargemünd, Germanujo. 1.50 gmk.

Paco, La (*Otani-Studentaro, Budaisma*).—Esperanta Grupo, Otani Universitato, Kioto, Japanujo. Po 1 respond-kupono.

Paris Esperanto (*Pariza Grupo*).—130 rue Amelot, Paris 11. 15 fr. fr.

Pola Esperantisto (*Pollanda Esperanto-Delegitaro*).—34 Lubicz, Kraków, Polujo. 5 sv. fr.

Praktiko, La (*Cseh-Instituto*).—172 Riouwstraat, Hago, Nederlando. 2.50 ned. g.

Revuo Orienta, La (*Japana Esperanto-Instituto. Enhavas rimarkindajn lingvajn studojn*).—Hongoo-ku, Motomaçi I, Tokio, Japanujo. 5 sv. fr (?).

Ruĝa Esperantisto (*Brita Laborista Esp. Asocio. Multobligita*).—36 Womersley Road, London, N.8. 1ŝ. 6p.

Scienca Gazeto (*Dumonata revuo popularsciencia*).—1111 Brooke Road, Rockford, Ill., Usono. 3.0 sv. fr.

Sennacieca Revuo (*Socialista, "S.A.T."-ideologia, Literatura*).—67 Avenue Gambetta, Paris 20. Prezo ne montrita.

Sennaciulo (*Sennacieca Asocio Tutmonda. Socialista, Sennaciisma*).—67 Avenue Gambetta, Paris 20. Prezo ne montrita.

Skolta Bulteno (*Skolta Esperantista Ligo*).—23 East Dulwich Grove, London, S.E.22. 1ŝ. (3ŝ., kun membreco de S.E.L.).

Suda Stelo, La (*Esperanta movado en Jugoslavujo : rimarkindaj ĉefartikoloj pri la movado ĝenerale*).—Slavonski Brod, Jugoslavujo. 5 sv. fr.

Sur Posteno (*Du samnomaj organoj de IPA : komunistaj. Eldono por Rusujo : Spiridonovka 15, Moskvo I. Eldono internacia : Postbox A 5, Amsterdam-Z, Nederlando. Prezoj nemontritaj.*

Svenska Arbetar Esperantisten (*Sveda Laborista Esperantisto*).—Upplandsgatan 1, Stockholm. 2.50 kr.

Svenska Esperanto-Tidningen ("La Espero").—(*Sveda Esperanto-Federacio*).—Biblioteksgatan 30, Stockholm. 2.50 kr.

UŜE-EĤO (*Eŭropanismo. Pan-Eŭropo*).—4 Strada Lonovici, Timisoara I, Banato, Rumanujo. 6 numeroj : 4 respond-kuponoj.

Vegetarano (*Internacia Vegetara Ligo Esperantista*).—I. Ionekku Kapatzana, Villa Zamenhof, Sisteron (B.A.), Francujo.

Verda Mondo (*Esperanta propagando, instruo, facila legaĵo, por Japanoj*).—Esperanto-Propaganda Asocio, Kameoka, Kioto-hu, Japanujo. 3 sv. fr.

Verda Revuo (*Sendependa revuo pri arto, scienco, amuzo*).—31-26 Hermannngasse, Wien VII, Aŭstrujo. 3 sv. fr.

Zamenhofa Esperanto (*Studoj pri Esperanto tia, kia ĝi estas en la Fundamento kaj en la verkoj de Zamenhof*).—Aperas neregule. D-ro P. Corret, 197 Bd. Brune, Paris 14. 10 numeroj : 4 respondkuponoj.

EDINBURGO

HISTORIA — ROMANTIKA — PENTRINDA



Abundas je lokoj pitoreskaj kaj historie interesaj. Provizas por la libertempulo senliman variecon de plezuro.

Oportuna centro por viziti famajn Skotajn pejzaĝojn

Bonega servado vagonare kaj aŭtomobile al ĉiu parto: ĉiutagaj ekskursoj dum la somero al "La Trossachs," "Melrose," la "Scott" Kamparo kaj la skotaj lagoj

Vastaj oportunoj por la Golf-ludo, la Teniso kaj aliaj sportoj

Por plena informo kaj oficiala gvidilo oni sin turnu al

**THE TOWN CLERK,
CITY CHAMBERS, EDINBURGH**

ESPERANTISTAJ LANDAJ ASOCIOJ

*La asocioj indikitaj per * aliĝis al la "Interkonsento de Kolonjo 1932."*

ARGENTINA ESPERANTO-ASOCIO, Misiones 369, Buenos-Aires.

Organo : Argentina Esperantisto.

AUSTRALAZIA ESPERANTO-ASOCIO, 185 Exhibition Street, Melbourne, Aŭstralio.

*AUSTRIA ESPERANTO-ASOCIO, Neue Hofburg, Heldenplatz, Wien I.

Organo : Aŭstria Esperantisto.

*BELGA LIGO ESPERANTISTA, Bd. St. Liévin 60 St. Lievenslaan, Gent-Gand.

Organo : Belga Esperantisto.

*BRAZILA LIGO ESPERANTISTA, Ave. Marechal Floriano 212, Rio de Janeiro.

Organo : Brazila Esperantisto.

*BRITA ESPERANTISTA ASOCIO, 142 High Holborn, London, W.C.1.

Organo : The British Esperantist.

BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO, Poŝtenska kut. 233, Sofia.

Organo : Bulgara Esperantisto.

*ESPERANTO-ASOCIO EN ĈEĤOSLOVAKA RESPUBLIKO, Uralské nám. 447, Praha-IX.

Organo : Bulteno ČAE.

*GERMANA ESPERANTO-LIGO EN ĈEĤOSLOVAKIO Klothildenstr. 6, II, Reichenberg.

Organo : Informilo GLČ.

*CENTRA DANA ESPERANTISTA LIGO, Danmarks-gade 28, Randers.

Organo : Dansk Esp.-Blad.

*DANZIGA ESPERANTO-ASOCIO, Töpfergasse 33. I. Danzig.

ESPERANTO-ASOCIO DE ESTONIO, Postkast 6, Tallinn.

Organo : Informoj de E.A.E.

ESPERANTO-ASOCIO DE FINLANDO, S-ro Hugo Salokannel, Uusikaupunki.

*SOCIETO FRANCA POR LA PROPAGANDO DE ESPERANTO, 34 Rue de Chabrol, Paris X. Organo : Franca Esperantisto.

- *GERMANA ESPERANTO-ASOCIO, Oppellstrasse 50, Dresden-N.6.
Organo : Der Deutsche Esperantist (Germana Esperantisto).
- HELENA ESPERANTO-ASOCIO, Str. 3 Septembriu 28. II. Athenai.
Organo : Lingvo Internacia.
- *HISPANA ESPERANTO-ASOCIO, Apartado de Correos 1089, Madrid.
Organo : Hispana Esp.-Gazeto.
- *HUNGARLANDA ESPERANTO-SOCIETO, Miksautca 15, Budapest VII.
Organo : Hungara Heroldo.
- FEDERACIO DE ISLANDAJ ESPERANTISTOJ, Posthof 7, Hafnarfjörður (Islando).
- *ITALA ESPERANTO-FEDERACIO, Galleria Vittorio Emanuele 92, Milano.
Organo : L'Esperanto.
- *JAPANA ESPERANTO-INSTITUTO, Hongoo-Motomači I-24, Tokio.
Organo : Revuo Orienta.
- JUGOSLAVA ESPERANTO-LIGO, Primorska 11, Zagreb.
Organo : La Suda Stelo.
- KANADA ESPERANTISTA ASOCIO, G.P.O. Box 272, Toronto.
- *KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO, Valencia 245, Barcelona.
Organo : Kataluna Esp.
- KUBA SOCIETO POR LA PROPAGANDO DE ESPERANTO, Apartado 1324, Habana.
- LATVA ESPERANTO-SOCIETO, P.K. 844, Riga.
Organo : Ondo de Daugava.
- LITOVA ESPERANTO-ASOCIO, Ukmerges pl. 45 but. 5, Kaunas.
Organo : Litova Stelo.
- *Nederlanda Esperanto-Asocio "LA ESTONTO ESTAS NIA," Linnaeusparkweg 100, Amsterdam-O.
Organo : Nederlanda Esperantisto.
- *NORVEGA ESPERANTISTA LIGO, P.K. 942, Oslo.
Organo : Norvega Esperantisto.

- NOVZELANDA ESPERANTO-ASOCIO, Room 106, G.P.E. Building, Wellington.
- *POLLANDA ESPERANTO-DELEGITARO, Lubicz 34, Krakow.
Organo : Pola Esperantisto.
- RUMANA ESPERANTISTA SOCIETO, Str. Sf. Voevozi 7, Bucuresti.
- *SVEDA ESPERANTO-FEDERACIO, Fack 698, Stockholm 1.
Organo : Sveda E.-Gazeto.
- *SVISA ESPERANTO-SOCIETO, Florastrasse 5, St. Gallen.
Organo : Svisa Espero.
- URUGVAJA ESPERANTO-SOCIETO, p. a. S-ro P. Casas, Calle San José 1123, Montevideo.
- *ESPERANTO-ASOCIO DE NORD-AMERIKO (E.A.N.A.), 1517 "H" St., N.W., Washington, D.C.
Organo : Amerika Esperantisto.

LA ESPERANTO-MOVADO EN DIVERSAJ LANDOJ

ARGENTINO

Buenos Aires.—(Federacia Distrikto) 3 organizoj propagandas la lingvon en la ĉefurbo de la Argentina Respubliko: “Argentina Esperanto-Asocio” (fond. 1916) kun sidejo ĉe la strato Misiones 369 (ĉirkaŭ la geografia centro de la urbo); “Argentina Esperanto-Kolegio” (fond. 1935), ĉe Lavalle 560, 1-etaĝo, entrepreno organizita de la samideanoj D-ro Miguel H. Catalano kaj Eugenio Iglesias Nuñez, por parolkursoj kaj propagando en oficialaj rondoj; “Instituto Argentino de Esperanto,” ĉe Craig 71, entrepreno fondita de S-ro Eterio Rodriguez Ontoria por leteraj kursoj kaj propagando.

Argentina Esperanto-Asocio.—De la jaro 1934 dece instalita en tuta domo kun du salonoj kaj kvin ĉambroj. Disponas de Biblioteko-legotablo-salono, sekretario, salono por kursoj, paroladoj, festoj, k.t.p., renkontejoj, presejo, dependaĵoj por la dommastro, k.t.p. Vizitebla ĉiutage (oficiale de 20—22h.). *Servoj:* informoj, eldonoj, kursoj, tradukoj, ekzamenoj. *Fakoj:* Instrua, Gazeta, Informa-propaganda, Libro-Serva-Biblioteko (kun 567 volumoj), Ekzamena. *Administra Komitato:* Prez. Giordano Bruno López, Vic. pr. Antonio Barrot, Sekr. Francisco Clevillé, Protok. Enrique Bravo, Kas José Martínez, Voĉd. C. Santos Fontán, Jorge Hess, Dionisio Ruiz, J. Alchera, P. Doubek, A. Ferrari, M. Nicksich, E. Rzodkiewicz, J. Sabaté, A. Solé, B. Berger. *Membraro:* rondcifere 150 (aktivaj kaj subtenantaj). *Parolkursoj:* mezkalkule 3 ĉiujare, kaj rondcifere 10 enkalkulante tiujn de la aliaj organizoj. *Kurso per Korespondado:* de la jaro 1932 en kiu estis ŝanĝita kaj komencita nova sistemo, la nombro de enskribitoj atingis la ciferon 3,875 ĝis Marto 1936. *Propaganda-Inforna Fakoj:* 3-4 miloj estas la meznombro de cirkuleroj kaj informiloj dissenditaj, kaj 100 la meznombro da ĵurnaloj, gazetoj, k.t.p., regule publikigantaj ilin. *Gazeta Fakoj:* eldonas la oficialan organon “*Argentina Esperantisto*” (fond. 1917), 17 x 25 cm., 12-14 paĝa, eldonkvanto: 500 ekz. rondcifere, (lasta numero: Jan.-Febr. 1936, IIIa epoko, Noj. 118-119). *Eldonoj:* Krom la gazeto kaj presitaj monataj informiloj, poŝtkartoj,

poŝkalendaretoj, sigelmarkoj, glumarkoj, leterpapero, propagandiloj, k.t.p. *Kampfestoj:* 3-5 dum la somera sezono sur luita tereno ĉe la bordo de la Plata rivero (Anchorena) kun propra tendaro. *Kuracista-Ĵurista Konsultejoj:* nova senpaga servo por la anoj, kreita dum 1935, sub la gvidado de D-roj Elias Mejliĵ kaj Virgilio A. Lasca (juristo). *Financoj:* de la jaro 1932 (reorganizigo) la budĝeto de la Asocio estas mezkalkulata 3-4000 argentinaj pesoj. La bilanco por la administra jaro 1934-1935 donis la jenajn ciferojn: *Elspezoj,* \$4,272.40; *Enspezoj,* \$4,924.32; *Favora saldo,* \$651.92.

Esperantistaj Organizoj.—Sendependaj de A.E.A., ekster Buenos Aires estas 8. En la provinco Buenos Aires 2; ĉe Bahía Blanca (70,000) “Centro Esperantista de Bahía Blanca,” str. O’Higgins 32 1.p., Prez. D-ro Salvador Sammartino, parol-leterkursoj; C. E. “Nova Sento” ĉe Pergamino (30,000) Prez. Jorge Abraham, str. Azcuénaga 753. En la provinco Santa Fé 4: ĉe Rosario (450,000) “Asocio Esperanta de Rosario,” str. Salta 1922. Prez. Ing. Hugo J. Ceretti, forta kaj bone instalita Esperanta organizo, parol-leter-radio-kursoj, publika kaj gazetara propagando; ĉe San Jorge C. E. “Lumo,” Prez. Prof. Lázaro Flury, propag. kaj parolkursoj; ĉe Serodino (20,000) “Nova Tago,” Prez. Juan E. Diaz, propag. parolkursoj; ĉe Hersilia (6,000) E. G. “Zamenhof,” Prez. lernejestro Pablo B. Zwiener, parolkursoj. En la provinco Córdoba 2: ĉe Córdoba (ĉefurbo kun 230,000 loĝ.) E. G. “Antaŭen” adr. ĉe la Prez. Ing. Manuel Espinosa, str. Belgrano 539, Ejo: Academia Sarmiento, str. Caseros 235, propag. parol-leter-kursoj, la Sek. D-ro Jaime Scolnik publikigas Esperantan kurson en la instruistara gazeto “La Palabra,” aŭtoro de la broŝuro “El Problema de un idioma internacional auxiliar,” eldono de la Córdoba Universitato, unue aperinta sur la revuo de tiu nacia universitato. “Grupo Esperantista de San Francisco,” ĉe San Francisco (20,000), str. Rioja 750, Prez. José Tesio, parolkursoj. En la Gubernio Misiones, 1; ĉe Posadas (ĉefurbo 18,000) “C. E. de Posadas,” str. Sarmiento 152, Prez. Agustín Alvarenga, parolkursoj.

Propagando per Radio.—S-ro ing. Hugo J. Ceretti disaŭdigas ĉiujare per la stacio L.T.1 (Radio del Litoral, Rosario) novaĵojn de la tutmonda Esperanta movado, horo 18-18.15. Krom tio radio-kurso helpita de speciale adaptita leter-kurso. D-ro Jaime Scolnik periode disaŭdigas informojn, gramatikajn Esperantajn klarigojn per stacio L.V.2 de Córdoba.

Propagando per Gazetaro.—Krom la citita estas menciinda la paĝo titolita: “Curso breve de Esperanto” (Mallonga kurso de Esperanto), kiu aperas regule en la grava ilustrita revuo “Ciencia Popolar” (Populara scienco), 22 x 31 cm., 70-paĝa, monata. Krom la kurso ĝi publikigas Esperantajn informojn, novaĵojn ilustritajn, k.t.p. Aperas en Buenos Aires. Gvid. E. Iglesias Nuñez, tiun ĉi Esperantan fakon. Ĉe la literatura gazeto “Simbolo” aperanta en Rosario, S-ro Francisco Gómez gvidas Esperantan fakon. En la nomita gazeto li publikigas E. kurson (unu paĝo) kaj informojn pri la Esperanta laborista movado (unu paĝo), 18 x 27 cm. 20 paĝa.

G.P.L.

AŬSTRALIO

La Esperanto-movado en Aŭstralio ne prosperas tiom kiam antaŭ du-tri jaroj. La ĉefa kialo estas, ke ne plu estas disaŭdigiĝitaj lecionoj de la Radio-Stacio (3.L.O.) Melbourne, per kiuj multaj personoj varbiĝis por la movado.

La Aŭstria Esperanto-Asocio ne plu funkcias, sed ekzistas grupoj en Melbourne, Sydney, Adelaide, kaj Brisbane. En Melbourne ankaŭ estas Laborista Esperanto-Asocio, kiu faras bonan propagandon inter la laboristoj. Ĝi ankaŭ eldonas ĉiudumonate hektografitan gazeton laŭ la P.E.K. modelo.

La Aŭstrialiaj Esperantistoj havas sian propran ekzamenon. La ekzameno estis starigita de la Melburna Esperanto-Klubo je la memoro de ĝia prezidinto, James G. Pyke. Ĝi okazas ĉiun novembron kaj rajtas partopreni ĉiuj Esperantistoj, sed tiuj kiuj studis ne pli ol unu jaron povas konkursi por la premio (£5.5.0).

Pro la vasteco de Aŭstralio estas malfacile organizi la Esperantistojn sukcese. Tamen oni povas aserti, ke kiel rezulto de la kursoj organizitaj de la diversaj grupoj, kaj pro tio, ke miloj da lernolibroj vendiĝis, ke troviĝas en Aŭstralio kelkaj cent personoj, kiuj kapablas uzi Esperanton parole kaj skribe, aŭ almenaŭ skribe.

R.R.

AŬSTRUJO

La Esperanta movado en Aŭstrujo havas jam pli ol 40-jaran historion, ĉar la lingvaj malfacilaĵoj en la antaŭmilita Aŭstrujo estis tre grandaj pro la multlingveco reginta en tiu ĉi ŝtato, kaj preparis favoran grundon por la disvastigo de neŭtrala helplingvo. Post la milito la interrompita movado refondiĝis kaj daŭrigis siajn progresojn, kiuj starigis nian landon, koncerne la Esperantan movadon, en la unuan vicon inter la diversaj ŝtatoj. La Aŭstruja Esperanta movado estas tre disvastigita, populara, portata de ĉiuj tavoloj de la loĝantaro, kaj forte subtenata de ĉiuj superaj registaraj oficejoj. La “*Aŭstria Esperanto-Asocio*” (Wien I.-Neue Burg) kun sia oficiala monata organo “*Aŭstria Esperantisto*” estas la landa organizo, kaj centro por la Esperantistaj lokaj grupoj, ekzistantaj ne nur en iom pli gravaj urboj, sed ofte eĉ en tute malgrandaj loĝlokoj en ĉiuj federaciaj landoj de Aŭstrujo, kaj disvolvantaj lokan varb-agon per Esperantaj kursoj, paroladoj, raportado al la lokaj gazetoj, k.t.p.

La dua centro, el kiu la Esperanta movado disradias en nia lando, estas la “*Internacia E-Muzeo*,” en Wien. Ĝi estis fondita 1929 de Kort. Kons. Hugo Steiner, kaj formas specialan sekcion de la ŝtata Nacia Biblioteko. Ĝi enhavas 7,000 volumojn, kaj pli ol 1,000 jarkolektojn de diverslandaj Esperantaj gazetoj. La Muzeo staras sub la protektorato de l’Federacia Prezidanto Miklas.

La plej grandajn sukcesojn akiris la Esperanta movado en la pasinta jaro sur la kampo de *fremdultrafiko*. Depost 1927 aperas en Esperanto projektoj kaj broŝuroj kun la celo konatigi Aŭstrujon al eksterlando. 1935 aperis: (1) Gvidlibro tra Aŭstrujo, 26 paĝa, kun multaj bildoj, eldonita de varboservo de Ministerio por Komercio en 10,000 ekzempleroj. (2) Gvidilo tra Brucknerlando (Supra Aŭstrujo), la plej bela aperinta ĝis nun en Esperanto. Eldonita de Fremdultrafika Oficejo en Linz kiel propagandilo por la Bruckner-memorifesto. (3) La sama gvidilo en nova eldono, kun invito al la 28a Kongreso. (4) Tre bela gvidilo tra Wien, eldonita de la Viena Fremdultrafika Oficejo. (5) Viena Foiro post 10-jara interrompo eldonis Esperantan propagandilon. (6) Gvidilo tra “Grossglockner Transalpa Sosco” eldonita de “Grossglockner-Hoch-Alpenstrassen A.G., Salzburg.

Ankaŭ la Viena radio-stacio ekkonis, ke al Esperanto oni devas koncedi konforman lokon en la sendoprogramo; tion atestas la Esperanta kurso, ĉiusemajne 25 minutojn. (Kort. Kons. H. Steiner), al kiu aliĝas pluaj 5 minutoj por

informado de l'eksterlando pri la preparoj por la 28a Kongreso. Krome, dufoje ĉiumonate okazanta "Esperanta servo por la eksterlando," kun la celo regule informadi la eksterlandan publikon pri okazaĵoj en Aŭstrujo, kaj varbi por vizito al turisme allogaj lokoj de la lando.

En la lernejoj Esperanto faras en Aŭstrujo progreson. La bazon por tio donas la 1925 fondita ŝtata Ekzamena Komisiono por Esperanto, okaziganta dufoje ĉiujare siajn ekzamenojn, kaj zorganta pri eduko de bone preparitaj Esperantaj instruistoj. La progresadon en la lernejoj apogis en 1935 la ministeria reskripto pri instruado de fremdaj lingvoj en "komercistaj lernejoj" 35.528-II/7, en kiu Esperanto estis allasita.

Generala Poŝtdirekcio decidis eldoni en 1935 serion da 50 diversaj vidaĵkartoj kun klariga teksto en la lingvoj germana, angla, franca kaj Esperanto. Ĝi presigos ankaŭ en la nunjara granda fervoja veturplano (horaro) la enkondukan ĉapitron kun difinoj, klarigoj de signoj, k.t.p., aperintan ĝis nun nur germane, france kaj angle, ankaŭ en Esperanto; samon ĝi faros ankaŭ en sia horaro poŝtato-busa. Oficiale instalitaj Esperantaj kursoj por poŝtoficistaro subtenas la enpenetradon de Esperanto en la servo de la poŝto.

La Aŭstruja gazetaro plejparte simpatias kun nia movado kaj publikigis en 1935 kelkcent artikolojn, raportojn, notojn pri Esperanto.

Resume, oni povas konstati: en Aŭstrujo Esperanto estas sur bona vojo okupi en la kultura vivo eminentan pozicion; ĝi estas subtenata de la registaro, kaj ĝuas ĉe ĉiuj influaj aŭstrujaj instancoj subtenon kaj akcelon.

A.E.A.

BRITUJO

Por plene kompreni la laboron faritan de la Brita Esperantista Asocio, oni devas unue konstati, ke la organizo en Britujo ne estas laŭ la ordinara sistemo uzata en la plimulto de la landoj en Eŭropo. La B.E.A. konsistas el individuaj membroj, kiuj ĉiuj ricevas la gazeton "*The British Esperantist*," kaj kiuj pagas rekte al la Asocio minimuman kotizon de 5 ŝil. (4 sv. fr.) aŭ la duonon por junuloj malpli ol 18-jara. Tio donas al la Asocio financrimedojn, kiuj ebligas la entreprenon de multaj aferoj alie tute ne eblaj. (La nuna membreco estas proksimume 2,300). Kompreneble ekzistas multaj Grupoj, kiuj estas filioj de la Asocio, sed membreco de Grupo ne per si mem signifas membrecon de la Landa Asocio.

Jam dum proksimume sep jaroj la Asocio posedas propran aŭtomobilon, kiu trairas la tutan landon. Per ĝi, la oficistoj vizitas Federaciajn Konferencojn, Grupojn, kaj propagandajn kunvenojn. Tamen ĝi estas plejparte uzata de la Propaganda Sekretario, por prelegoj kaj demonstraciaj lecionoj en lernejoj. Dum la lasta jaro li vizitis proksimume 100 lernejojn, kaj prelegis al 10,000 lernantoj kaj 400 instruistoj. Kvankam nur malofte oni povas tuj starigi kursojn en la lernejoj, la intereso pri la movado rapide kreskas, kaj la rezultoj estas tre kontentigaj. Kutime la aŭtomobilo veturas minimume 40,000 kilometrojn jare.

La B.E.A. ankaŭ organizas la libro-vendadon por la lando, kaj ĝi havas eble la plej bonan provizon de Esperantaj libroj en la mondo. La jara vendado sumiĝas je proksimume £1,300 (20,000 sv. fr.).

La Asocio ĉiujare organizas grandajn karavanojn al la Universala Kongreso, kaj almenaŭ du karavanojn al aliaj landoj. Krome ĝi nun estas rekonata turista agentejo, kaj prizorgas biletojn por ĉiu parto de la mondo.

Oni oficiale instruas Esperanton en la Universitato de Liverpool, kaj en proksimume 20 ŝtataj tag-lernejoj, kaj eble 50 vesper-lernejoj, kun bona sukceso.

La ĵurnalaro preskaŭ ĉiam presigas artikolojn aŭ alian informon pri Esperanto, se ĝi estas interesa por la ĝenerala publiko. Dum 1935 ni ricevis 908 gazet-eltranĉaĵojn.

En Junio 1935 la Asocio starigis *Jubilean Kason*, per kiu oni intencas akiri sufiĉe da mono por aĉeti propran hejmon en Londono. Donacoj bone enfluas, Federacioj kaj Grupoj organizas foirojn, dancojn, k.t.p. por helpi ĝin, kaj ni esperas, ke dum la Jubilea Jaro ni jam havos sufiĉan sumon por malfermi nian "Esperanto-Domon."

Resume, oni povas diri, ke la movado tute ne stagnas en la lando, sed kontraŭe, progresas, kvankam ne tiel rapide kiel oni deziras vidi.

B.E.A.

LA BRITA ESPERANTISTA ASOCIO,

142 High Holborn, Londono, W.C.1.

OFICISTOJ, 1936-7.

Prezidanto: G. D. Buchanan, F.R.A.S.

Vic-Prezidantoj: J. J. Boutwood, J.P., F.B.E.A., Prof. W. E. Collinson, M.A., Ph.D., E. Rosslyn Mitchell, M.A., LL.B., J.P.

Hon. Sekretario : Bernard Long, B.A.

Hon. Kasisto : W. A. Gething, B.Sc., F.B.E.A.

Hon. Advokato : G. Mercer Hollis.

Konsilantoj : F-ino J. Baird, F.B.E.A., E. D. Durrant, Pastro W. J. Downes, M.A., B.D., C. C. Goldsmith, F.C.I., F-ino G. H. Moxon, M.A., F-ino V. C. Nixon, B.A., A. C. Oliver, F.B.E.A., F-ino E. Richardson, R. Robertson, F.B.E.A., F-ino M. H. Rook, K. R. C. Sturmer, P. L. Wright.

Administra Komitato : La Prezidanto, Hon. Kasisto, Hon. Sekretario, F-ino M. L. Blake, F-ino R. A. Davey, C. C. Goldsmith, W. M. Goodes, H. W. Holmes, E. de Knevet, W. H. Matthews, A. C. Oliver, R. Robertson, F. E. Wadham, S-ino E. Warren.

Eduka Komitato : F-ino V. C. Nixon (Sek.), F. B. Bourdillon, M. C. Butler, W. M. Goodes, B. Long, F-ino G. H. Moxon, S-ino G. Gladstone Solomon, Nowell Smith, K. R. C. Sturmer, A. Thorburn.

Korespondaj Kursoj : Sekretario, Pastro W. J. Downes, M.A., B.D.

Ekzamenistoj : W. Bailey, F-ino L. Briggs, D-ro D. R. Duncan, G. M. Hayton, G. W. Roome, A. Venture.

Komitato por la Instruista Diplomo : F-ino V. C. Nixon (Sek.), F-ino A. L. Borel, A. Thorburn.

Komitato por la Licenciata Diplomo : F. E. Wadham (Sek.), M. M. Du Merton, M. C. Butler.

Ekzamena Komitato : D-ro D. R. Duncan, G. M. Hayton, F-ino V. C. Nixon, A. Venture, F. E. Wadham.

Redaktoro de "The British Esperantist" : F. E. Wadham.

Sekretario : R. B. Wilkinson.

Eduka kaj Propaganda Sekretario : M. C. Butler, M.R.S.T.

Korespondanto por la eksterlanda gazetaro : E. D. Durrant.

Radio-Sekretario : E. D. Durrant.

Sekretario por la Kolonioj : M. M. Du Merton.

BULGARUJO

Bulgara Esperantista Asocio.—Fondo 1911 (heredinta la B.E.L., fondita en 1907)—Organizo : centra komitato, izolaj membroj, kunigitaj en kolekta grupo ĉe la centra komitato kaj lokaj societoj. Kotizo : 20 levoj jare po persono. Gazeto : *Bulgara Esperantisto* monata en Esperanto kaj bulgara lingvoj. Servo : propagando. Stato : 14 societoj kun 277 membroj. Estraro : Prez. Petr. Jordanov, Vicprez. D-ro Zaĥari Zaĥariev, Sek. -kasisto : Belĉo T. Oktomvrijski, Konsilantoj : Ivan Dobrev, Stefan Minkov, Stefan Radev, kaj Atanas D. Atanasov. Adreso : str. Alabin 50, Sofia.

1. Esperanta societo. Sofia, str. Alabin 50.
2. "Espero," Ruse, per Dim. Ivanov, str. Prista 28.
3. "Solidareco," Ruse, str. Aleksandr. I, 22.
4. "Albatro," Varna, per Georgi N. Sapringiev, Gradskata biblioteka.
5. "Lumo," Tärnovo, per Ivan Nenkov, str. Väzstaniĉeska 22.
6. "Kulturo," Plovdiv, per Szebrju Petrov, Narodna banka.
7. "Radio," Pazarĝik, per Jordan Lupov, Lovnija dom.
8. "L. L. Zamenhof," Oreĥovo, per d-ro Georgi p. Ivanov.
9. "Vekiĝo," Ŝumen, per Ilija Todorov, str. Pälnokladenĉeva 338.
10. "Rila verda stelo," Dupnica, per Kosta Antonov, str. Ĥr. Gränĉarov. 9.
11. "Sukceso," Vraca, per Radoslav Triĉkov, str. Knjaĵevska. 63.
12. "Espero," G. Oreĥovica, per Ivan S. Stojnov, Narodna banka.
13. "Stelo," Kärĝali, per Vasil V. Tenĉev.
14. "Toleremeco," Jambol, per d-ro Zaĥari Paskalev, str. Knjaĵevska.

Gazeto : *Bulgara Esperantisto.*—Organo de la Bulgara Esperantista Asocio. Monata. Fondita 1919, 16 p., 24.5 x 17.5 cm. Red. kaj adm : str. Alabin 50, Sofia. Abono : 20 levoj enlande, 1 sv. fr. aŭ 4 respondkuponoj eksterlande.

B.E.A.

ĈEĤOSLOVAKUJO.

Ĉefaj faroj de la lasta jaro estis : En propagando ĝenerala : la 6-a nacia kongreso en Brno, 27-29-an de septembro 1935. Kunvenigis 209 kongresanojn el 73 diversaj lokoj (krom 2 eksterlandanojn el Genova kaj Wien). Tri ministerioj kaj estraro de ministraro sendis al la kongreso salutleterojn respondantajn al la invito ; la leteroj estis malpli koncizaj ol antaŭ tri jaroj por la kongreso en Olomouc. Landa ofico en Brno sendis al la kongreso altan oficiston. La kongreso akceptis rezoluciojn al ministerioj komerca, fremdlanda, lerneja kaj poŝta, al Radio-jurnalo, al ĵurnalista sindikato. La asocio transdonis la rezoluciojn al koncernaj lokoj. Sed ankaŭ ĉe aliaj okazoj estis kontakto kun oficialaj aŭtoritatoj sufiĉe ofta. De ministerio fremdlanda ricevis Ĉ.A.E. malgrandan subvencion por la Ĉeĥoslovaka antologio. La Bulteno de la asocio povis dum la jaro 1935 enskribi informojn pri aktiveco de esperantistoj en 96 lokoj. Propaganda semajno estas aranĝata jam dum 7 sinsekvaj jaroj ĉiam en la unua semajno oktobra. Tre sukcesa metodo propaganda estis proponadi en gazetoj sendon de ŝlosilo kaj de flugfolio "unu lingvo por la tuta mondo" post ricevo de 1 Kĉ-poŝtmarko ; venis mendoj de kelkaj cent homoj. Propagando per gazetoj sukcesis, ke artikoloj pri Esperanto aperis dum 1935 en pli ol 2,000 ĉs gazetoj. La radio-disaŭdigoj estis sume 40. Stacidomaj tabuloj pendas en 79 stacidomoj. Du turistajn broŝurojn aperigis dum 1935 la ministerio fervoja kaj unu grupo en Uĥerské Hradiště. Karavano de fervojistoj iris Nederlondon, estona karavano trairis nian landon. Da propagandaj presajoj presigis Ĉ.A.E. sume 18.500 ekz.-ojn. Krom la Bulteno de E.A.Ĉ.S.R. kaj Informilo de G.E.L. aperas monata propaganda gazeto en Prostějov "Ligilo," redaktata de F. Heikenwälder. Adreso de Esperanto-Asocio en Ĉ.S.R. estas Praha XIX Uralské 447.

E.A.C.R.

DANUJO

Laŭ la lasta kompleta jarlibro, la jarlibro de 1934, Centra Dana Esperantista Ligo konsistas el 21 grupoj kun 460 membroj, sed dum la du lastaj jaroj ĝi multe plifortiĝis kaj kreskis.

En 1933 estis fondata Dana Esperanto-Instituto, kiu precipe havis la taskon aranĝi kursojn per eksterlandaj Ĉseh-metodaj instruistoj. Per granda propagando oni

sukcesis aranĝi multajn kursojn, kaj dum la du pasintaj vintroj pli ol 1,500 kursanoj estas instruitaj en ĉiu vintro. Bedaŭrinde nur malmultaj el ili daŭrigis la studadon kaj aliĝis al iu klubo, sed tamen oni sukcesis fondi multajn novajn klubojn kaj pligrandigi la nombron de membroj en la jam ekzistantaj kluboj.

Krom la laborista ligo kun 6 grupoj, kiuj ne aliĝis al la neŭtrala ligo, Centra Dana Esperantista Ligo estas la sola ligo Esperantista en Danujo. Oni povas esti rekte membro de C.D.E.L. aŭ membro pere de iu klubo, kiu aliĝis al C.D.E.L. La kotizo estas : rektaj membroj, 3 Kr. ; klubanoj, 2.50 Kr. Ĉiu membro de C.D.E.L. samtempe estas membro de U.E.A., kaj C.D.E.L. pagas la kotizon al U.E.A. Cetere ĉiu membro senpage ricevas la gazeton *Dansk Esperanto Blad*, kiu depost la 1a de Januaro 1936 estas monata gazeto.

Nuntempe estas sub C.D.E.L. 44 kluboj, kaj kun la rektaj membroj (izoluloj) la nombro de la membraro estas proksimume 1,200. La ligo estas gvidata de estraro kun 7 membroj. Ĉiu estrarano havas sian apartan taskon de la organiza laboro. Krom la estraro ekzistas ankaŭ regionaj gvidantoj, kiuj havas la taskon doni helpon al kluboj en ĉies regiono pri la kluba laboro, pri kurso, prepari kursojn en novaj lokoj, fondi novajn klubojn k.t.p.

C.D.E.L. ĉiujare havas dutagan ĵarkunvenon dum Pentekosto, kaj eksterlandaj samideanoj ĉiam estas bonvenaj al tiu kunveno.

Dum la lasta jaro C.D.E.L. eldonis kelkajn librojn, kaj depost la 1a de Novembro 1935 ĝi havas regulan libroservon. La ekonomia stato de la ligo estis dum multaj jaroj malfacila, sed sekve de pli multaj membroj kaj diversaj entreprenoj de la ligo la ekonomia stato nun pliboniĝis rimarkinde.

Do, oni rajtas diri, ke la Esperanto-movado en Danujo nun en ĉiu rilato estas multe pli forta ol iam antaŭe.

N.B.

ESTONUJO.

En 1935 la estraro de E.A.E. konsistis el : R. Kapper, prez. ; J. Törn, viceprez. ; He Dresden, sek. kaj ĉefdel. de U.E.A. ; V. Nummelin, vicek ; E. Lübek, kas. ; E. Eik, juriskonsulto ; E. Loorsoo, G. Taalman, H. Tulp, A. Siitam, kaj J. Jaanisto. Aliĝis 13 Esp. organizajoj kun 772 anoj. La organo de E.A.E. "Informoj" aperis regule.

Tre bonajn interrilatojn E.A.E. havis kun la Ŝtata Propaganda Oficejo, kiu regule provizis E.A.E. per materi-

alo por la monataj Esp. disaŭdigoj. E.A.E. helpis per radio kaj Esp. gazetoj diskonigi la Estonan Librojaron. Laŭ instigo de E.A.E. la urbestro de Tapa donis al unu el siaj stratoj la nomon " Esperanto Strato." E.A.E. kunlaboris kun la aliaj baltaj landoj dum la jaro, kaj faris multan propagandan laboron. En lernejo en Häädemeeste la gelnantoj decidis lerni Esperanton anstataŭ aliaj fremdlingvoj. Kelkaj kursoj okazis por fervojistoj kaj skoltoj.

Radio estas unu el niaj plej favoraj agadkampoj: tie ĉiumarde okazas 10-minutaj disaŭdigoj pri Estonujo kaj la Esp. movado, kaj ĉiun trian dimanĉon de la monato—escepte somere—duonhoraj disaŭdigoj pri Estonujo.

Generale la estraro de E.A.E. penis agi por la disvastigo de Esperanto tiom, kiom permesas la cirkonstancoj en la nuna tempo, kiam oni propagandas en Estonujo kontraŭ la lernado de fremdlingvoj, kaj kiam pro la kreskado de la nacia sento estiĝis opinio, ke al homoj ŝatantaj sian patrolandon, ne konvenas okupi sin per tiaj problemoj, kia estas la ideo de lingvo internacia. E.A.E.

FINNLANDO

La agado de Esperanto-Asocio de Finnlando estis daŭre malfacila, persista batalo sur la laborkampo esperanta dum pasinta agadperiodo. Ekonomia stato, manko de laborfortoj, estis aferoj, kies efiko tre peze montriĝis tra la tuta periodo. Pro tiuj ciitaj aferoj oni ne povas fanfaroni pri rezultoj, sed tamen kun helaj esperoj ni finis tiun ĉi periodon, ĉar oni povas observi ĝojigajn viglajn signojn. Ekzemple, la partopreno al diversaj kursoj de Esperanto estis relative vigla kaj same la agado de lokaj societoj, speciale la agado de Laborista Esperanto-grupo en Viipuri kaj de Laborista Esperanta Grupo Unueco en Helsinko.

Laŭ la decido de la jarkunveno de Esperanto-Asocio de Finnlando 1935 oni aprobis la kontrakton pri kunlaboro inter baltaj landoj. Al la kontrakto apartenas nun 6 Esperanto-Asocioj el jenaj landoj: Finnlando, Svedujo, Estonujo, Litovujo, Latvujo, kaj Danujo.

En la jarkunveno de E.A.F. 1936 profesoro G. J. Ramstedt estis elektita kaj kiel prezidanto kaj kiel estraro estis elektitaj: doktoro U. Pesonen, magistro Vilho Setälä, instruistino Elmi Tamminen, prokuristino Helmi Koivuniemi, staciestro H. Salokannel, instruisto T. Aurela, direktoro T. Auer, doktoro L. I. Lappi, fervojisto U. Aaltonen kaj oficistino Elli Taskinen. E.T.

FRANCUJO

S.F.P.E. (Société Française pour la Propagation de l'Esperanto) konsistas nun el 16 federacioj regionaj kun 134 grupoj, kaj 6 fakaj asocioj. La nombro de la membroj fine de 1935 estas 3,697 (1 P, 17 M.S., 242 M.A., 361 M.J., 3,076 S.M.), kontraŭ 3,247 en 1934.

La kotizoj de S.F.P.E. al U.E.A. dum 1935 atingis 22,931.50 fr. fr. Samtempe la membroj pagis al S.F.P.E. 8,376.75 fr. fr.

La financa situacio de la S.F.P.E. estas jena: Bonhavo je la 1.1.1935=12,558.95 fr. fr. Enspezoj 1935=102,400.50 fr. fr. Elspezoj 1935=43,960 fr. fr. Profito=58,440.50 fr. fr. Bonhavo je la 31.12.35=70,999.40 fr. fr.

La financa situacio de la " Franca Esperanto-Instituto " estas jena. Bonhavo je la 1.1.1935=943.10 fr. fr. Enspezoj=2036.50 fr. fr. Elspezoj=2,233.65 fr. fr. Bonhavo je la 31.12.35=745.95 fr. fr.

La financa situacio de la oficiala gazeto de S.F.P.E. *Franca Esperantisto*, kies eldonnombro estas 1,500 ekzempleroj, estas la jena. Malprofito la 3.1.1935=206.95 fr. fr. Elspezoj=16,798.75 fr. fr. Elspezoj=15,742.95 fr. fr. Bonhavo je la 31.12.35=848.85 fr. fr.

La ĉefa celo de la propagando de S.F.P.E. estas la enkonduko de Esperanto en la lernejojn. La propagando tiacele atingis la ŝtatestraron (malfermo de kurso en supera lernejo pri Aerveturado en Paris, post aprobo de S-ro Ministro Generalo Denain, oficiala reprezentado de la Franca Ministro pri Publika Instruado al la Nacia Kongreso en Arras, pere de rektoro S-ro Chatelet, kaj al la Universala Kongreso en Romo pere de S-ro Rousseau), la parlamenton (starigo de Esperanta grupo en la Ĉambro de Deputitoj kun 90 membroj, depono de propono de rezolucio pri enkonduko de Esperanto en la lernejojn), kaj la regionaj, distriktaj kaj urbaj konsilantaroj. 10 regionaj, 4 distriktaj kaj 79 urbaj konsilantaroj voĉdonis deziresprimon tiacele, kiuj estis poste transdonitaj al la Ministro.

8 novaj urboj donis la nomon de D-ro Zamenhof al strato (Romans, Arras, Marly les Valenciennes, Houilles, Liévin, Perpignan, Thiers, kaj Banyuls sur Mer).

Por plia amplekso de la propagando, S.F.P.E. organizis oficejon je la 1.1.1935 kaj luis grandan loĝejon la 15.1.1935. (Esperanto Franca Centro, 34 rue de Chabrol, Paris X).

400 kursoj okazis sur la teritorio, kun proksimume 10,000 lernantoj. Dum la jaro, la Franca Esperanto-Instituto disdonis 7 pedagogiajn atesteojn (1934=0), 34 atesteojn pri kapableco (1934=48), 13 superajn atesteojn (1934=25), kaj 476 atesteojn pri lernado (1934=291).

Radio-kursoj okazis en pluraj radio-stacioj (Paris, Lille, Lyon, Limoges, Grenoble, Nice). Perkorresponda kurso de S.F.P.E. funkcias kun 250 lernantoj. 10 novaj grupoj estis starigitaj. La faka propagando bonege prosperis.

Turismo: Organizo de karavano al Romo okaze de la Universala Kongreso, kun 300 partoprenintoj. Oficiala ekzameno en Esperanto organizata de la Ministrejo, por la taksi-ŝoferoj. Eldono de gvidlibroj de la turismaj sindikatoj en pluraj urboj kaj de reklammarkoj en Elbeuf kaj Vire.

Komerco: Granda uzado de Esperanto de la Foiroj de Paris, Lyon kaj Marseille. Esperanto-budo en la vagonara ekspozicio, kaj en la foiroj de Paris, Lyon, Marseille, Lille, Denain, Saint Omer, Valenciennes, Strasbourg, k.t.p.

Armeo: Enkonduko de Esperanto en la armeo. Unua Esperanta kurso al 60 soldatoj en Châlons sur Marne, interkonsente kun la Generalo de la loka soldataro.

Metiistoj: Enkonduko de Esperanto ĉe la metiistoj. Deziresprimo tiacele.

Tekniko: Esperanto-kursoj en superaj lernejoj pri Artoj kaj Metioj (Châlons sur Marne, Lille, Angers), en lernejo pri horlogmetio (Besançon), en multaj komercaj lernejoj. Resumoj en Esperanto en la fakgazetoj: Revuo por la Elektristoj, Phare Médical (Kuracista Lumturo).

Ampleksa propagando tra la tuta lando okazis dum la dua dusemajno de Oktobro (propaganda dusemajno). Klopodoj ĉe la urbaj konsilantaroj, ekspozicioj en montrejoj, publikaj paroladoj kaj festoj, vendado de kartoj de simpatiantoj (po 2 fr. fr. t.e. 1 fr. fr. por la grupo kaj 1 fr. fr. por S.F.P.E.), malfermo de novaj kursoj, propagandaj lumbildoj en la kinoj, k.t.p.

Post la kursoj, S.F.P.E. organizis interkonsente kun *Literatura Mondo*, prelegvojaĝon de S-ro Baghy. La paroladoj de S-ro Baghy okazis de Januaro ĝis Aprilo 1936, en 60 diversaj urboj. 5,000 personoj ĉeestis tiujn paroladojn kies ĉefa temo estis: "La literaturo Esperantista," kaj "La praktika valoro de Esperanto."

Fine, S.F.P.E. ne forgesis la propagandon ekster-eŭropan en la francaj kolonioj. La grupoj bone kreskis en

Alĝerio, kaj Indo-Hinujo. Nova grupo estis starigata en Nouméa (Nouvelle Calédonie) kaj la propagando daŭre funkcias en Maroko, Tuniso, Togo, Madagaskaro). Eĉ S.F.P.E. starigis perkorrespondan kurson kun profesoro en Ismaïlia (Egiptujo) por la maristoj kiuj trapasas la Suezkanalon. (Vidu ankaŭ paĝojn 132-136.)

P.P.

ISLANDO

La organizita Esperanto-movado en Islando estas malforta. La federacio de islandaj Esperantistoj (adreso: Poŝtkesto, 7 Hafnarfjörður), konsistanta el apartaj grupoj kaj izolaj membroj, estas preskaŭ nur noma. Sed tamen la nombro de la Esperantistoj ĉiam kreskas en diversaj lokoj de la lando, kaj la intereso de la publiko pligrandiĝas. Okazas Esperanto-kurso pere de la ŝtata radio en Reykjavík, instige de la Federacio. Instruas sinjoro Torbergur Tordarson, verkisto, kiu ankaŭ gvidas privatan kurson Ĉe-metodan. Ankaŭ instige de la Federacio oni nun preparas kaj lernolibron de Esperanto kaj vortaron Esperantan-islandan, ĉar la ĝis nun ekzistanta lernolibro (kun vortaro) elĉerpiĝis. Kelkaj fervoruloj komencis eldoni hektografitan Esperanto-gazeton, parte ankaŭ en islanda lingvo. Redaktoro: Torsteinn Finnbjörnsson, Rejkjavík. Ĝis nun aperis tri numeroj.

O.K.

KANADO

En Marto 1935, la kanadaj gesamideanoj fine decidis starigi nacian asocion. Unufoje, antaŭ la granda milito, ili provis fari tion sensukcese. La fondajo de la nuna asocio estas du kluboj, unu en Toronto, la alia en Hamilton. Tiuj kluboj vivis sufiĉe longe por certigi ke ili daŭre ekzistos.

La Asocio ne kreskas tre rapide. Ĝi ne havas la subtenon de riĉuloj, kaj vivas preskaŭ tute per la kotizoj kaj vendo de libroj. Estas du lingvoj en Kanado, la franca kaj la angla. Tiu malhelpas la progreson de Esperanto. Oni parolas la francan lingvon nur en Quebec; kaj la popolo tie, ĝenerale, estas tre malriĉa. La Asocio havas nur tri membrojn kiuj loĝas en Quebec, kaj povas paroli la francan lingvon. El ili, du estas angloj. Trans la miloj da mejloj en Kanado, oni bezonas nur la anglan lingvon.

Dum ĝia unua jaro, la Asocio varbis sesdek naŭ membrojn. Pli ol la duono estas en la du urboj, Toronto kaj Hamilton. Kompreneble, la Kanada Asocio ne eldonas gazeton. La laborantoj nun devas doni ĉiun klopodon al la instruado kaj eltrovo de interesuloj. Oni devas logi en Kanado por esti membro.

D.R.P.

KATALUNUJO

Landa asocio: Kataluna Esperantista Federacio.
Adreso: carrer València, 245, pral.—Barcelona:
presorgano: Kataluna Esperantisto. **membroj:**
350.

En la lando ekzistas la sekvantaj grupoj, en kiuj regule okazas kursoj: En Barcelona: Nova Sento, Paco kaj Amo, Iberia Esperantista Grupo, Juneco, Enciklopedio Akademio Espero, Universala Frateco, Barcelona Stelo, Akademio Laborista Esperanto, Zamenhof-Instituto, Esp. Sekcio de Ateneu Enciclopèdic Popular, Esp. Sekcio de Ateneu Popular de Gràcia, Esperanta Violeto, Barcelona Esperantisto kaj Juneco kaj Vivo. Esperanto-Grupo en Vic, Lumon en Terrassa, Flugiloj en Caçà de la Selva, Esperanta Burĝono en Rubi, Esperanta Idealo en Sta. Coloma de Farners, Aplec en Sabadell, Girona Espero en Girona, Interligilo kaj Frateco en Granollers, Klubo Palma en Palma de Mallorca, Solleric en Soller, Esperantista Amikeco en Manlleu, Esperanta Nesto en Ripoll, Empordana Ebenajo en Armentera, Bela Espero en Manresa, Frateco en Vendrell, Esperanto-Grupo en Ripoll kaj Brava Marbordo en Roses.

La landa asocio havas delegitojn en la sekvantaj lokoj: Reus, Vilafranca del Penedès, Girona, Manresa, Puigcerdà, Sta. Coloma de Farners, Terrassa, Vendrell, Vic, Ripoll, Sabadell, Sta. Coloma de Queralt, Vilassar de Mar, Banyoles, Tarragona, Manlleu, Agramunt, Roses kaj Sta. Margarida de Montbui.

Estas rimarkinde, ke la enlandaj instancoj iom post iom subtenas kun pli da intereso nian movadon. Tion pravas la fakto, ke ne malpli ol dudek urberstaroj aliĝis al la nunjara XVIII Kataluna Esperanto-Kongreso, kaj ke multaj el ili donis premion por la XVII Internaciaj Floraj Ludoj.

La ministro de Kulturo de la Kataluna Registaro akceptis la prezidantecon de la nomita Kongreso, kaj ĉe ĝia malfermo faris tre favoran paroladon kaj promesis oficialan subtenon.

K.E.F.

LITOVUJO

Esperanto en Litovujo lastatempe progresas. Tiun progreson kaŭzas la reorganizo de Litova Esperanto-Asocio, kiu okazis antaŭ du jaroj, t.e. en 1934 somere, la 29-30 de Junio, kiam en Kaŭnas estis kunvokita la 1a Litova Esperanto-Kongreso, dum kiu estis decidite eldoni (renovigi) la organon de L.E.A. "Litova Stelo," kaj elektita energia kaj laborema nova Centra Komitato de L.E.A. Prezidanto B. Giedra; Vicprez. J. Lazauskas; Kasisto Vl. Butkus; Sekretario A. Prapuoleuis kaj Estrarano L. Alseika, Ĉefdelegito de U.E.A. por Litovujo. En 1934 ni havis nur 3 filiojn de L.E.A.—nuntempe ni havas 12 filiojn kaj minimume 300 anojn, kiuj pagas membrokotizon. Nuntempe en kelkaj lokoj ekzistis kaj ekzistas Esperanto-kursoj, ekzemple, en Kaŭnas, en Marijampole, en Šiauliai, en Naŭmiestis, en Panevežys, en Tauragi kaj en Vilkaŭiskis. Ni havas en kelkaj lokoj librejon, ekzemple, en Kaŭnas, en Šiauliai, Paneverup. Krom tio en 1935, ni komencis eldonadon de renovigita litova revuo "Litova Stelo," kiu aperas ĉiun duan monaton kaj estas 16 paĝa, ilustrita, plej parte en Esperanto. Nunjare ĝi aperos plibonigita kaj pli interesa por Esperantistoj. Ĝi estas disvastigata en multaj landoj kaj havas bonan sukceson. Nunjara novelektita estraro de L.E.A. (la unua kaj centra organizado en Litovujo) estas jena: Prez. J. Lazauskas; vicprez. S. Sabalis; Kasisto Vl. Butkus; sekretario A. Prapuoleuis, kaj estrarano L. Alseika. La organizado de L.E.A. ĉiam plifortiĝas kaj plivastiĝas. Precipe provincaj ekinteresiĝas pri Esperanto. Lastatempe aperis nova lernolibro de Esperanto por litovoj de instruisto A. Prapuoleuis kaj granda Esperantolitova Vortaro de B. Giedra. Baldaŭ aperos dua lernolibro de B. Giedra. Entute ni opinias, ke en Litovujo estas jam kelkaj miloj (2-3) neorganizitaj Esperantistoj.

Lastjare ni komencis kunlaboron kun Ĉebaltŝtataj Esperantistoj kaj naciaj organizadoj (Estono, Finnlando, Dana, Sveda, Norvega). Ni pripensas kunvoki komunan Esperantan Kongreson aŭ konferencon en iu ĉefurbo.

Pri Esperanto ni multe propagandas en naciaj gazetoj. Dum litova-latva komuna kongreso ni proponis kelkfoje enkonduki Esperanton kiel ĉebaltmarlandan komunan lingvon.

Nia radiostacio ankaŭ (dufoje semajne) dissendas esperantlingvajn paroladojn pri Vilnius kaj pri litova kulturo.

Vl. B.

NORVEGUJO

Por disvastigo de Esperanto en Norvegujo laboras Norvega Esperantista Ligo (N.E.L., Norsk Esperanto-Forbund) fondita la 27an de Januaro 1911. Adreso: Postkasto 942, Oslo. La estraro nun konsistas el: Prez.: S-ro Einar Stjernesund; vicprez.: F-ino Liv Sandberg; ĝenerala sekretario: S-ro Arnfinn Jensson; sekretario: S-ro Støp-Bowitz; kasistino: F-ino E. Grønneberg.

La Ligo konsistas el aliĝintaj kluboj kaj izolaj membroj. Nuntempe ĝi havas 21 klubojn kaj proks. 30 izolulojn. Entute proks. 450 membrojn. Krome ekzistas pluraj kluboj ankoraŭ ne aliĝintaj kun proks. 200 membroj.

La organo de N.E.L. estas *Esperantobladet* (Norvega *Esperantisto*), kiu aperas monate, escepte de julio kaj aŭgusto. Ĝia redaktoro estas f-ino Liv Sandberg.

N.E.L. estas aliĝinta al U.E.A.

Ĝi ĉiujare aranĝas kursojn en diversaj lokoj, parte kun eksterlandaj, parte kun norvegaj instruistoj. Lastjare por proks. 400 personoj. Krome, N.E.L. havas bonan korespondan kurson kun ĉirkaŭ 50 lernantoj. Entute 10,000 personoj lernis Esperanton en Norvegujo dum la lastaj 6 jaroj. La ekzamena komisiono aranĝas elementajn kaj superajn ekzamenojn.

N.E.L. per sia librofako eldonas propagandan kaj instruan materialon kaj tradukitajn literaturajn verkojn de norvegaj aŭtoroj (ekz. Bjørnstjerne Bjørnson: *Gaja Knabo*). Lastjare aperis norvega eldono de la lernolibro de Seppik-Malmgren: *Sistema Kurso en Esperanto*. Prilaboris kap. R. Bugge-Paulsen.

La Stata Radio promesis al N.E.L. kvaronhoron ĉiunmonate por esperantaj programoj. Du radio-jurnaloj, inter ili la oficiala organo de la Stata Radio *Hallo-Hallo*, ĉiusemajne enhavas la Esperantajn radioprogramojn.

La gazetaro estas sufiĉe favora. N.E.L. ĉiusemajne dissendas notojn pri Esperanto al pli ol 100 gazetoj, kaj registris dum 1935 900 artikolojn, k.e., dum la unuaj tri monatoj de 1936 la nombro estas 425. Atakoj kontraŭ Esperanto preskaŭ ne okazas. *Hamar Arbeiderblad* havas konstantan Esperanto-rubrikon.

Ekzistas ankaŭ Asocio de Laboristaj Esperantistoj en Norvegujo (Arbeidernes Esperantoforbund) por disvastigo de Esperanto speciale inter la laboristoj. Ĝi estas fondita en 1924 kaj havas proksimume 10 grupojn, plejparte en Oslo. En kunlaboro kun la kleriga asocio de laboristoj

(Arbeidernes Oplysningsforbund) A.L.E.N. okazigas Esperanto-kursojn. Ĝi havas sian propran organon *Arbeideresperantisten* (*La Laborista Esperantisto*).

La Esperanto-movado en Norvegujo progresas konstante, kvankam malrapide. Dum la lasta tempo la organizado kaj la kontakto inter N.E.L. kaj Esperantistoj en la diversaj lokoj fariĝis tre bona. En la plej multaj urboj nun troviĝas Esperantistoj.

N.E.L.

NOVZELANDO

Nuntempe Esperanto progresas firme kaj konstante ĉi-lande, dank' al la agado de la Novzelanda Esperanto-Asocio post restarigo en 1929, kaj al la persista utila laborado de dek unu kluboj nun funkciaj. Kvankam Novzelando estas angla-parolanta lando, tiel fortiĝis la movado ĉi tie, ke oni nun eldonas nacian ĵurnalon en Esperanto—*La Interna Ideo*,—kaj la entrepreno prosperas.

Propagandon ĝeneralan entreprenas la nacia organizado N.Z.E.A., kiu nun havas 320 membrojn en 80 lokoj. Ĝiaj ĝisnunaj agadoj konsistas el eldono de du propagandiloj, organizo de deputacio al la Ministro por Publika Eduko, kompilado kaj enkonduko de koresponda kurso, helpo starigi novajn klubojn, brodkasto de radiaj paroladoj kaj kurso de 20 lecionoj, dissendo de cirkuleroj al ĉiuj tagjurnalaj redaktoroj kaj al parlamentanoj, kaj okazigo de sep kongresoj. Ĉiu N.Z.E.A. ofico estas honora.

Samideanoj ĉi tie ĝojegas pro la fakto, ke je la unua fojo, Novzelando estos reprezentata ĉe la Brita Kongreso kaj ĉe la Universala Kongreso ĉi-jare. Krom tio ili ĝojas ĉar la Laborista Registaro, enoficigita en pasinta Novembro, havas kiel punkto en sia programo la enkondukon de Esperanto-instruado en novzelandajn lernejojn. Dum la nuna jaro N.Z.E.A. oficistoj celas diskuti Esperanto-aferojn kun la Ministraro. Ĝenerale, la novzelanda publiko estas amika al Esperanto, kvankam kelkaj tagjurnalaj redaktoroj skribas de tempo al tempo, favorante la anglan anstataŭ Esperanto kiel internacian lingvon.

W.H.K.

PORTUGALUJO

Tra tuta Portugalujo la plej vigla propagando. Dank' al la nelacigeblaj klopodoj de Portugala Teritorio de U.F.A., Portugala Instituto de Esperanto, Nova Vojo kaj Lespa, la ideo amplekse disvastiĝas en ĉiujn kampojn sed precipe la proletan.

Portugala Teritorio de U.F.A.—Av. Duque de Loulé, 50-3°—Lisboa. Kursoj en Touring Club de Portugal, Politeknika Lernejo al gelnantoj de ĉiuj Fakultatoj, Azilo-Lernejo Antonio Feliciano de Castilho al blindaj geprofesoroj kaj monitoroj, kiuj siavice instruas siajn samsortanojn. Komerca Lernejo per Korespondado, kiu enprogramigis pagan kurson per korespondado. Perradiaj paroladoj, starigo de provincaj librosekcioj, gvido de Esperantaj Sekcioj en ĵurnaloj *Republica*, *Ponto-Traco*, k.a., ĉefdelegita tasko, nomanta delegitojn de U.F.A. en ĉiuj distriktaĵ ĉefurboj, eksterlanda movado, oficiala uzado de esperantista polica servo, k.c.

L.E.S. Nova Vojo, Rua do Jardim do Regedor, 5.4°, Lisboa. Kursoj multoblaj, starigo de filioj, gvido kaj redakto de *Portugala Esperantisto*, k.c.

Portugala Instituto de Esperanto, Rua do Jardim do Regedor, 5.4°, Lisboa. Grava kurso perpoŝta, dissendata tra la tuta Portugalujo kaj Kolonioj, gvido de dumonata paĝo en influa gazeto *A Vida Social*.

Lespa (L.E.S. Progresemaĵ Amikoj), Rua da Praia, Barreiro. La plej granda laboro kaj entuziasmo en la vera ĉefurbo de la portugala Esperantujo. Esperantigo de la suda parto de Portugalujo per metoda kaj efika propagando.

Ankaŭ laboras—L.E.S. Antaŭen, Ligo de l'Okcidentaj Esperantistoj, Nova Sento, kaj multaj grupoj kaj grupetoj. En la dua ĉefurbo de Portugalujo—PORTO—la entuziasmo estas granda, kaj oni propagandas grandege, malgraŭ la malhelpo de la lokaj aŭtoritatoj.

J. DE S.C.

SVEDUJO

3-jara laborplano.—Sveda Esperanto-Federacio (S.E.F.) starigis por la periodo 1935—1937 t.n. 3-jaran laborplanon por la estraro kaj kluboj. Montriĝis, ke ĝi bone efikas al la laboremo de la esperantistoj. Sed estas ja ĉiam pli facile kaj pli interese labori, kiam oni havas antaŭ si certan kaj ne tro malproksiman celon, precipe se oni ligas al la celo ankaŭ konkurencon.

Membronombro.—S.E.F. konstante kreskis ekde la jaro 1935, kaj la membronombro nun alproksimiĝas al la cifero 3,000.

Propaganda fondaĵo.—Por propaganda celo estis kreata Propaganda fondaĵo. Dank' al konkurenco inter la kluboj ili kolektis en 1935 sumon de 1,230 svedaj kronoj. Krom tio fervora samideano, s-ro A. O. Ehlin en Sala, kiu mortis printempe 1935, testamente donacis 1,000 kronojn.

“Verda semajno.”—Dum la semajno 23—29 septembro 1935 okazis en tuta Svedlando plej intensa publika Esperanto-propagando sub la nomo “Verda semajno.” Ĉiuj kluboj ricevis diversajn laborkonsilojn kaj modelajn gazetartikolojn por la lokaj gazetoj. La plej multaj kluboj agis laŭ la konsiloj, kaj la “verda semajno” fariĝis tre ŝatata kaj vekis grandan atenton inter la granda publiko.

Enlanda gazet servo.—S.E.F. faris gravan propagandon pere de la gazeta informoservo. La estraro dissendis al la sveda gazetaro informojn pri Esperanto. Dum la jaro 1935 la gazetoj en Svedlando publikigis entute 1,630 artikolojn pri Esperanto.

Eksterlandaj gazet servo.—Ekde aŭtuno 1934 la organizajo Sved-Internacia Gazet servo (The Swedish-International Pressbureau) dissendas ĉiusemajne turismajn kaj ekonomiajn novaĵojn pri Svedlando al 75 Esperanto-reprezentantoj en 27 landoj. Tiuj gazetinformoj ampleksas 3 ĝis 4 paĝojn ĉiusemajne. Tiu praktika uzo de Esperanto donis tre kontentigan rezulton, tiel ke la nomita oficiala entrepreno ankaŭ estonte daŭrigos uzi la servojn de la esperantistoj. Kaj ni povas konstati, ke ni tie ĉi renkontas organizaĵojn ne-esperantistan, kiu helpas nin atingi la ĝeneralan utiliĝon de Esperanto.

Eksterlandaj instruistoj.—Lastjare S.E.F. kunlaboris kun la jenaj Esperanto-instruistoj, kiuj gvidis plurajn kursojn en la tuta lando: S-inoj Erika Seppik kaj Madeleine Haudebine, S-roj Fr. Szilagyi, T. Morariu, H. Seppik, A. Rois kaj Alinger-Ajo. Ili grave helpis la disvastiĝon de Esperanto.

Popularscienca prelegserio.—D-ro Fr. Szilagyi gvidis dum la printempo 1935 en 6 urboj 12-tagajn prelegseriojn kun la enhavo “La historio de la mondlingva problemoj” kaj “La literaturo de Esperanto.” Bonaj rezultoj.

Tutlanda prelegvojaĝo.—La javana redaktoro Hadzi Raden Mustapha faris dum la tempo aŭtuno 1934—printempo 1935 sisteme organizitan kaj tre sukcesan prelegvojaĝon tra tuta Svedlando. Prelegtemoj: “Java, la sorĉa insulo

de la Hinda oceano” kaj “Bali, la lando de dioj kaj demonoj.” Entute s-ro Mustapha prelegis en ĉ. 200 lokoj.

Esperanto-filmo.—Dum la Stokholma Esperanto-kongreso 1934 S.E.F. pretigis Esperanto-filmon *Morgaŭ ni komencos la vivon.* Longo : 2,200 m. La filmo en serioza kaj interesa maniero rakontas pri du junaj geedzoj, jaluzo, murdo, komplikajoj kaj la feliĉiga finaĵo. La filmdialogo estas en Esperanto. Por ke la filmo donu la plej bonan servon celante propagandi Esperanton, la estraro de S.E.F. pretigis tutvesperan programon, en kiu la filmo estas la ĉefa punkto. La programo ankaŭ enhavas paroladon pri Esperanto kaj klarigan paroladon pri la pretigo de la Esperanta filmo. Krom tio gramofondiskoj en Esperanto. Nur aŭtune 1935 S.E.F. komencis la dissendon de la filmo kune kun la tutvespera programo, kiu akiris multan ŝatton inter la kluboj.

Ekspozicio.—“La fluganta ekspozicio” estis konstante uzata de la diversaj kluboj kaj bone servis kiel propagandilo.

Modelaj prelegoj.—La estraro pretigis modelajn prelegojn pri *Esperanto, ĉies dua lingvo kaj Per Esperanto al Roma, Malta kaj Tripoli.* La kluboj rajtas lui la prelegojn post repago de la sendkostoj.

La koresponda kurso.—Ĝis la fino de 1935 entute 36,350 personoj mendis la elementan korespondan kurson de S.E.F. Pro la malalta prezo de la kurso, 1 sveda krono, la kurso fariĝis tre ŝatata kaj devas esti konsiderata kiel la plej bona propagandilo de Esperanto.

Librovendado.—Eldona Societo Esperanto, kiu grandparte estas posedaĵo de S.E.F., en la jaro 1935 vendis librojn por 43.956:19 svedaj kronoj. Plej grava novel-donita libro lastjare estis Sved-Esperanta vortaro, la plej ampleksa Esperanto-vortaro en Eŭropo.

Ekzamenoj.—Sveda Esperanto-Instituto estas la ekzamenata institucio de Svedlando. En 1935 la instituto ekzamenis 2 personojn por la Instruista atesto, 17 por la Supera kaj 106 por la Elementa ekzamenoj.

Turistvojaĝoj.—Esperanta Turista Komisiono aranĝis en 1935 plurajn vojaĝojn al Estonujo kaj krome grupvojaĝon al Italujo kaj Parizo. Entute partoprenis la vojaĝojn 350 personoj.

Radiaj dissendoj.—La radiaj dissendoj okazis unufoje monate. Dum la printempo 1935 d-ro Karl Söderberg prelegis pri diversaj temoj, kaj aŭtune universitata profesoro Björn Collinder prelegis pri la temo “Kompara lingvosploro.”

E. M.

USONO.

La movado en Usono denove vigliĝis iom depost 1934, spite de ankoraŭ gravaj ekonomiaj malfacilaĵoj, dank' al la sindona kaj oferema laborado de la Ĝen. Sekr., Joseph Leahy, en Washington, D.C. La vasteco de la seninterrompa angle-parolanta teritorio de Usono kaj Kanado kulpas, ke la loĝantoj ne pli ĝenerale interesiĝis pri Esperanto. Nur vere larĝhorizontaj, aŭ kleraj aŭ idealistaj usonanoj aliĝas al la movado. Plie la vere kolosaj distancoj en Usono malfaciligas la vojaĝon de la samideanoj al la ĉiu-jaraj naciaj kongresoj. Tamen ĉiu-jare kunvenas 60-80 samideanoj.

Al la Esperanto-Asocio de Norda Ameriko (E.A.N.A.—fondita en 1905) kun Centra Oficejo en Washington, D.C. (1517 H. Street, N.W.) apartenas nun 3-400 membroj. Miloj da aliaj Esperantistoj ne estas membroj pro financaj kialoj. Estas proksimume 100 instruistoj en Usono, kies klasoj nombras meze 35-40 entuziasmajn lernantojn. Unu klaso de s-ro Hastings okazas en la usona parlamentejo en Washington, kun 70 usonaj deputitoj kaj ge-oficistoj.

Dum 30 jaroj E.A.N.A. servis al Usono kaj Kanado. Depost 1935 funkcias en Kanado aparta landa asocio. La tuta membraro de E.A.N.A. apartenas al U.E.A. kiel simplaj membroj. De ili 82 aliĝis kiel MJ, MA kaj MS.

Depost 1933 s-ro Joseph R. Scherer vojaĝas tra Usono en sia “Ruliĝanta Hejmo Verda Stelo,” surrada dometo tirata post ordinara aŭtomobilo. Li jam donis 700 profesiajn paroladojn en Usono, helpate de sia patrino kiu funkcigas la projekcian aparaton. Dum 3 jaroj s-ro Scherer jam vojaĝis 120,000 km en Usono, Li ĉie vizitas la samideanojn, faras por ili kelkajn senpagajn paroladojn, rekte pri Esperanto, kuraĝigas la timemulojn, kaj montras kiel ili devas propagandi. La profesiaj paroladoj pri diversaj landoj de Azio kaj Eŭropo per konstantaj rimarkoj pri Esperanto estas tre bona malrekta propagando por nia movado.

Okazas ĉiu-jare kongreso de E.A.N.A. Ĉe la 28-a nacia kongreso en New York (1935) elektiĝis la jenaj oficistoj : Prez., Joseph R. Scherer, Los Angeles, Calif. ; Vic. Prez., James F. Morton, Paterson, N.J. ; Ĝen. Sekr., Joseph Leahy, Washington, D.C. ; Kasistino, F-ino Kruka, Washington, D.C. ; estro de la Aga Komitato : s-ro E. G. Dodge. La 1936 nacia kongreso okazos en Detroit, Michigan dum Julio.

E.A.N.A. eldonas la monatan organon "Amerika Esperantisto." La Amerika Esperanto-Instituto (Dir. Karl Froding) eldonas la "Sciencan Gazeton" kaj agas kiel libro-agentejo; La Amerika Esperanto-Akademio (Prez., Prof. A. Kenngott) fondita en 1935 estas sendependa grupo de Esperanto-kleruloj kaj verkistoj, kaj celas la instigon al originala verkado kaj tradukado de usonaj ĉefverkoj, kaj eldonas akademian diplomon al tiuj, kiuj jam posedas la diplomon pri instrua kapableco de E.A.N.A. Funkcias ankaŭ la "Benson School of Esperanto" en Newark, N.J., kiu eldonis en 1932 la "Universalan Esperanto-Metodon," kaj la laborsidejo de s-ro Fred A. Hamann, en Wauwatosa, Wisc., eltrovinto de "Ispo" steno-sistemo.

E.G.D.

LANDAJ ĈEFDELEGITOJ KAJ PERANTOJ DE U.E.A.

Lando	Nomo	Adreso	Poŝtĉeka konto
Aŭstrujo	Gustav Weber	Esperanto-Muzeo, Neue Burg, Wien 1.	D 123-836 (Aŭstria Esp.)
Belgujo	Morris de Ketelaere	25 Oostenstr., Antwerpen	Antwerpen 41.0889
Brazilo	D-ro L. da Costa Porto Carreiro Neto	Rua 24 de Maio 424, Rio de Janeiro	
Britujo	Fred E. Wadham	Holmbury, Woodcote Hurst, Epsom (Surrey)	
Bulgarujo	Peranto: R. K. Tričkoff	Ul. Knjajevska 76, Vratza	
Ĉeĥoslovakujo	Ĉefdel. vakas Vic-Ĉefdel. Johannes Klinger	Schillerplatz 846, Bodenbach-Podmokly	
Danujo	Martin P. Palsberg	Nyborggade 3, Aarhus	Postgiro 42044
Estonujo	F-ino Helmi Dresen	Postkast 6, Tallinn	
Finlando	F-ino Elmi Tamminen	Siltavuorenranta 4 A 16, Helsinki	
Francujo	Célestin Rousseau	2 Rue Alfred-de-Vigny Bécon-les-Bruyères, Seine	Paris: 698.55
Germanujo	Fritz Thieme	Oppellstrasse 50, Dresden N. 6	8464 Dresden
Hungarujo	Paŭlo Balkanyi	Budapest 507	
Italujo	Peranto: Esperanto-Centro Itala	92 Gallerio V. E. Milano	3-18715, Milano

LANDAJ ĈEFDELEGITOJ KAJ PERANTOJ DE U.E.A.

Lando	Nomo	Adreso	Poŝtĉeka konto	
Japanujo	Ĉikao Fujisava	Japana Esp.-Instituto, Hon- gro-Motomaĉo, Tokio	1457.10 s'Gravenhage	
Jugoslavujo	D-ro D. Maruzzi	Ilica 47, Zagreb		
Latvujo	Talivaldo Indra	Kr. Barona iedal 104, dz 19, Riga		
Litovujo	Liudas Alseika	Zemtvark, Kedainiai		
Nederlando	P. H. Mooij	Teunisbloemlaan 19, s'Gravenhage		
Norvegujo	Ragnv. Rian	Dreyers gt. 13, Trondheim		
Novzelando	L. E. Dust	20 Chelsea Street, Mira- mar, Wellington		
Polujo	J. Ŝapiro	33 ul. Marsz. Pilsudskiego Białystok		Warszawa 60.047
Portugalujo	J. de Saldanha Carreira	Ave. Duque de Loulé 5- III, Lisboa		
Rumanujo	Terit. Sekr.: F-ino E. Morariu	Str. Bravilor 10, Cluj		
Svedujo	Karl Wästfelt	Lundagatan 44, uppg. 2, IV. Stockholm		
Urugvajo	Pedro Casas	San José 1123, Montevideo		
Usono	Nacia Sekr. : D. E. Parrish	328, W. 46th St., Los Angeles, Calif.		

REGULARO

PRI LA SERVO DE INFORMPETO

Fundamenta Principo : Ĉiu membro rajtas uzi la servojn de la Delegitoj. La servoj mem estas senpagaj, sed la uzanto devas repagi la elspezojn de la Delegito.

Oni rajtas peti informojn pri : Komerco, industrio, trafiko, laboro, dungo, salajroj, turismo, instruado, junulaj, studentaj kaj virinaj aferoj, ktp. Pri fakdemandoj oni skribu rekte al la faka Delegito, se tia ekzistas.

Oni ne povas peti informojn pri : Komerca pago-kapablo, morala indeco de persono (konfidencaj informoj). Tamen, tiukaze la Delegito rajtas interrilati kun loka agentejo, kiu sin okupas pri tio.

La Delegito rajtas rifuzi servojn, kies plenumon li juĝas kontraŭa al sia honoro aŭ konscienco.

Plendoj : Informpeto ne respondita de la Delegito normale sep tagojn post ĝia ricevo, rajtigas la petinton plendi ĉe la Centra Oficejo, kiu enketos. Oni ankaŭ plendu okaze de malbone farita servo.

Atentu : 1. Skribu tre legeble, precipe la adreson. Tiu-ĉi estu skribata ĉiam en nacia lingvo kaj per latinaj literoj.

2. Skribu sur la adresflankon post la nomo, la titolon Delegito de U.E.A., tiel, ke se la Delegito forestas, la letero estu transdonata al la Vicdelegito.

3. Aldonu post la subskribo la kuponon pri servopeto kaj ripetu sur ĉiu sendaĵo la plenan adreson. Stampo kun adreso estas rekomendata.

4. Aldonu al la informpeto respondkuponon (eĉ se ĝi estas presajaĵo).

5. Skribu ĉiam en Esperanto, la oficiala lingvo de U.E.A. La uzo de nacia lingvo nuligas la rajton al plendo.

6. Aŭfranku sufiĉe la korespondadon.

7. Ne forgesu, ke la delegiteco estas honora ofico, kiun la Delegito akceptis por utili al Esperanto. Sekve faciligu lian taskon, ne ĝenante lin per petoj tute malgravaj.

Ĉi tiuj reguloj validas laŭsence ankaŭ por la rilatoj kun la Centra Oficejo de U.E.A.

Dum Vojaĝo : Ĉar la Delegito plej ofte ne disponas libere pri sia tempo, la membroj vojaĝantaj skribe informu la Delegiton pri sia vizito, almenaŭ 24 horojn antaŭe.

La Delegito havas la devon helpi la vojaĝanton. Sed oni memoru, ke ne estas la tasko de la Delegito atendi la fremdulojn en la stacidomoj, ilin akompani, fari komisionojn por ili ktp.

ACOROJ

Açores — Arquipelago dos Açores

Portugala. Konsistas el 9 insuloj kun sume 254,000 loĝantoj.

Angra do Heroismo. 10,000.

D: Joao Francisco d'Avila, instruisto, Escola Comercial de "Madeira Pinto."

Ponta Delgada (San Miguel). 51,760.

D: D-ro Lucio Sant 'Ana de Miranda, matematika profesoro, Rua de Teófilo Braga 12.

ALBANUJO

Shqypni

Shkoder (Skutari). 30,000.

D: Cuk Simoni, komercisto.

ALĜERIO

Algérie

Alger. 220,000.

D: Philippe Planès, prokuristo, 51 rue Michelet.

VD: Simon Salmon, prokuristo, 1 rue Guillaumet.

Biskra.

D: Roger Touitou, advokato, rue Besse.

Philippeville (Constantine). 50,000.

D: André Arcamone, komercifcisto, 28 rue d'Austerlitz.

VD: Emile Jean Cuomo, vinberkulturisto, Damremont.

ARGENTINO

Argentina — Republica Argentina

Bahia Blanca (Buenos Aires). 100,000.

D: Vicente Orlando, fervojfocisto, Alsina 257.

Buenos Aires. 2,200,000.

D: Andres Villafranca, artvitrajisto, Str. Chacabuco 617.

VD: Giordana Bruno Lopez, profesoro de muziko, San Pedrito 341.

Cordoba. 230,000.

D: Manuel Espinosa, elektro-inĝeniero, Belgramo 539, F.C.C.C.

Iberlucea (Santa Fé).

D: Francisco de Maria, fervojisto, F.C.C.C.

La Plata. 190,000.

D: Salvador Querin, stenografisto, 17-1267, F.C.S.

Morteros. (Cordoba). 6,000.

D: Vicente Domingo Bonetto, librotenisto, F.C.C.A.

Perez Millán. 2,000.

D: Iberio M. Rodriguez, komercisto, Fabrica de Refrescos, F.C.C.C.

Rosario de Santa Fé.

D: Hugo J. Ceretti, radio-inĝeniero, 9 de Julio, 3,301.

Santa Fé. 104,500.

D: Silvio Marani, mekanikisto, 25 de Mayo 3,086, F.C.C.A.

Villa Calzada. 2,000.

D: Paulo Doubek, oficisto, Str. Altamira s/n, F.C.S.

AŬSTRALIO

Australia — Commonwealth of Australia

Alectown (New South Wales).

D: E. Unger, farmisto.

Blackheath (N.S.W.).

D: F. A. W. Thomas, "Bonзара," Seaforth Road.

Brisbane (Queensland). 310,000.

D: Oscar H. Behncken, ŝtatoficisto, c/o Taxation Office, George Street.

Hobart (Tasmania). 50,000.

D: Douglas Guilbert, reg. ofc., Lands Dept.

- Leongatha** (Victoria).
D: William Gray, farmisto, Whelans R.O.
- Melbourne.** 1,100,000.
D: Roy R. Rawson, 169 Exhibition Street.
VD: F-ino V. Cox, 31 Albany Crescent, Surrey Hills.
- Newcastle** (New South Wales). 100,000.
D: Frank V. Taylor, instr., Central School, Broadmeadow.
- Parramatta** (New South Wales). 20,000.
D: D-ro Sydney Woolnough, kurac., 57 Macquerie St.
- Sydney** (New South Wales). 1,260,000.
D: Leslie Pfahl, koloristo, 64 Brighton Street, Croydon.
- Tamworth** (New South Wales). 157.
D: Reg. Cleary, P.O. Box 157.
- Warwick** (Queensland). 8,000.
D: Conrad Dornbusch, arkitekturisto, Avalon.
- Wellington** (New South Wales). 4,500.
D: Thomas L. Enderby, sukerajisto, 106 Lee Street.

AŬSTRUJO

Österreich — Republik Österreich

Ĉefdelegito (prov.) : Gustav Weber, Int. Esperanto-Muzeo, Neue Burg, Heldenplatz, Wien I.

- Afritz** (Kärnten).
D: F-ino Antonie Listner, eksinstruistino.
- Braunau am Inn** (Oberösterreich). 5,000.
D: Josef Salzlechner, bakisto, Lederergasse 5.

